

HORIZONTO

III-a JARO N-o 18 (6)
NOVEMBRO - DECEMBRO 1978

KULTURA KAJ INFORMA REVUO



Ateno: La Akademio

ĈU TIO ĈI ESTAS NEŬTRALECO?

BJALISTOKO - MIA PATRINA URBO

MIA PENSO

DE LA NEŬTRALA ESPERANTO MOVADO

HORIZONTO

Direktorino
Inés Gastón
Redakta Komitato
Salvador Gumá
Juan Régulo
Jean Thierry
Red. kaj Adm.
Inés Gastón
P.º Marina Moreno, 35
Telf. (976) 22.05.21
Zaragoza-1 (Hispanujo)
Eldonkvanto 1.000 ekzempleroj
Dumonata revuo
Presita en Zaragoza
ĉe "Tipografía C. Boloix"
str. Reina Fabiola, 7, Zaragoza-8
Leĝa Depono Z-133-76
N.º 6 - Novembro - Decembro 1978

E N H A V O

ĈU TIO ĈI ESTAS NEŬTRALECO? (Ivo Lapenna)

EL NIA LETER-KESTO...

OKCIDENTA EŬROPO (EK) KAJ LA TRIA MONDO. Prelego (Paul Neergaard)
LA E. E. K. FARIĜIS BABEL-TURO (Jean Thierry)

NEŬTRALECO KAJ HUMANECO. Inaŭgura Parolado (Prof. I. Lapenna)

KELKAJ IMPRESOJ PRI LA IV-a INTERNACIA KONFERENCO DE NEM

BJALISTOKO — MIA PATRINA URBO (trad. N. Z. Maimon)

BELETRO

Mia Penso (L. L. Zamenhof)

Malbonsorto (trad. J. Kohen-Cedek)

Plenigo (trad. Jan Smykalski)

BLANKA MARMORO KAJ RUGA VINO (Bernard Golden)

AL LA GEKANTISTOJ EL TERRASSA (trad. J. Ventura)

LA PERDITA HONORO DE IU KATARINO BLUM DE HENRIKO BOELO (Rikardo Ŝulco)

ESPLORO KAJ DOKUMENTADO (ED) Redaktas (Ivo Lapenna)

KION VI NE LEGOS ALILOKE

Letero de Prof. Ivo Lapenna al la Redaktoro de «der esperantist»

TRA LA ESPERANTO GAZETARO. Raportas (Jean Thierry)

KIEL ABONI?

Abonojn al "Horizonto" akceptas la Administracio: Inés Gastón, Paseo Marina Moreno, 35, Zaragoza-1, Hispanujo. Pĝk. Zaragoza 00428398 (Jarabono 500 pto.), aŭ la sekvantaj.

PERANTOJ

Aŭstrujo:

Dro. Klaus Perko, Lendkai 111, A-8020 GRAZ. Pĝk. Graz 1257.845. Jarabono: 160,— S.

Britujo:

Geoffrey King, 14 Elmdale Road, LONDON N13 4UL. Pĝk. 37.507.9106. Jarabono 5 £.

Danlando:

Peter Zacho, Nørregardsvej 91, DK-2610 RØDOVRE, Pĝk. 6287859. Jarabono: 60,— D Kr.

Finlando:

Finna Esperanto-Librejo, PL 221, SF-70101 KUOPIO 10, Pĝk KU 152801-5. Jarabono: 38,— F. Mk.

Francujo:

André Bourdeaux, 91 rue de la Chapelle, F-75018 PARIS. Pĝk. Paris 21.670.96 V. Jarabono: 40,— Fr.

FR Germanujo:

Heinrich Müller, Mommsenstrasse 5, D-3000 HANNOVER 1. Pĝk. Hannover 120 854-301. Jarabono: 24,— DM.

Grekujo:

Adda Sakelaropoulou, Sokratous 88 Omonia, ATHENO 101. Jarabono: 380,— Grekaj Drakmoj.

Israelo:

Ben-Alter Jehiel, P. O. B. 379, PETAH TIKVA. Pĝk. Bank Hadoar, 4-45854-8. Jarabono: 84 izr. liroj.

Jugoslavio:

D-ro Oton Pancer, Voćarsko Naselje 10, YU-41000 ZAGREB.

Kanado:

Kriss Smilga, 34 Martin Road. TORONTO, Ont. M4S 2V2. Jarabono: 8,— \$.

Luksemburgo:

Albert Wickler, 1 rue de Kehlen, L OLM. Konto N.º 5603/6196-3, CEE (Caisse d'Épargne de l'État). Jarabono: 380, luksemburgaj frankoj.

Rumanujo:

Mihail Petre Dungeanu, P.O. Box 502 R-5806 SUCEAVA.

El ĉiuj aliaj landoj oni pagu al unu el tiuj perantoj, ĝis peranto en tiu lando estos trovita. Personoj pretaj funkcii kiel perantoj, bv. sin turni al la direktorino.

PLEJ GRAVAJ VERKOJ

Eldonejo: PLAZA & JANES, S. A.
ESPLUGAS DE LLOBREGAT
(Barcelona - Hispanujo)

ĈU TIO ĈI ESTAS NEŬTRALECO?

En la verko *Hamburgo en Retrospektivo* estas abunde dokumentita kaj analizita la kontraŭneŭtraleca konspiro en UEA. Post tio, ekde 1976, en *Horizonto* aperis pliaj dokumentitaj informoj pri la partipolitikaj statutoj, programoj kaj agadoj de organizaĵoj kaj instancoj en UEA mem, precipe de la t.n. Centra Laborrondo Esperanto de GDR, Ĉeĥa Esperanto-Asocio, Slovaka Esperanto-Asocio kaj Bulgara Esperanto-Asocio (*Horizonto* n-roj 3/76, 6/76, 1/77, 4/77, 6/77, k.a.).

Sub la premo de tiuj malkovroj kaj de la ŝokiĝo, kiun ili kaŭzis ĉe parto de la membraro de UEA, la menciitaj instancoj estis devigitaj formale ŝanĝi la kernajn partipolitikajn partojn de siaj statutoj kaj programoj. Ni skribis, ke pro tiu "malgranda venketo — malgranda, ĉar nur formala — *Horizonto* certe povas esti kontenta, eĉ fiera", sed ni tuj aldonis: "nenio ĝis nun indikas, ke BEA kaj aliaj partipolitikaj organizaĵoj fakte ĉesigis sian partipolitikan agadon en la sino de UEA" (*Horizonto*, 4/77, p. 79).

PLIA PARTIPOLITIKA PROPAGANDO

Efektive, la partipolitika propagando ne nur ne ĉesis, sed intensiĝis konforme al la soveta oficiala linio de "akrigo de ideologia lukto, formo de klasbatalo sur la internacia areno, en kondiĉoj de malstreĉiĝo", kiel prezentite kaj antaŭvidite en *Hamburgo en Retrospektivo*, precipe en ĉap. 5.1. Abundas artikoloj, rezolucioj, alvokoj, eĉ poemoj por la soveta "pacama politiko" kun samtempaj atakoj kontraŭ prezidenton Carter, la usonan registaron, la "imperialistojn", la "kapitalistajn landojn", kies politiko estas prezentata kiel ekskluzive militista, agresiva kaj minacanta la mondan pacon. Sufiĉas trafolumi kiun ajn el la organoj de la Esperanto-organizaĵoj en la landoj de la Varsovia Pakto, aliĝintaj asocioj de UEA, por tuj konstati tion. Ekzemple, *der esperantist* n-ro 89/78 publikigis sur la unua kaj dua paĝoj alvokon al la tutmonda esperantistaro subteni la agadon de la t.n. Mondpaca Konsilantaro kaj de ĝia MEM-sekcio kontraŭ Carter, kiu "volas konstrui novajn terurajn armilojn, notinde la abomenan, satanan neŭtronbombon", ktp. En n-ro 90/78 de la sama periodaĵo aperis insulta poemo "Pripensu Sinior' Senatoro" (p. 1); plus "Rezolucio" de la Esperanto-organizaĵoj de Bulgario, Ĉeĥoslovakio, Germana Demokratia Respubliko, Hungario, Pollando (ĉiuj aliĝintaj asocioj de UEA) kaj Sovet-Unio (ŝajne, baldaŭ aliĝonta) "kontraŭ la neŭtrona bombo"; plus pliaj "Protestoj kontraŭ la neŭtrona bombo" (ĉio sur p. 2), ktp.

Kompreneble, neniu "protesto" estas direktita kontraŭ la gigantan produktadon de amasmortigiloj en la landoj de la bloko, kvazaŭ ili estus nenio alia ol bongustaj, anĝelaj ĉokoladbombonoj, uzataj por dolĉigi la ĝuojn de "paco", nek estas farita eĉ aludeto al ĉiaspecaj armiloj kaj militekspertoj, kiujn la simbola blanka kolombino kun olivbranceto de "paco" en la beko transportas sub siaj larĝaj flugiloj al ĉiuj partoj de la mondo por inciti aŭ helpi terorismajn agojn, ribelojn, fratmortigajn kaj regionajn militojn.

Ni tute ne tuŝus tiun demandon en *Horizonto*, se la menciita unupartia politiko ne estus propagandata ne nur en la sino de UEA, sed, fakte, fare de granda konsista parto de UEA, nete kontraŭe al ĝia Statuto, sen kia ajn reago fare de la gvidantaro de la Asocio. Tial ĝi estas plia grava partipolitika kompromitiĝo de la tuta UEA.

Provokitaj de tiu bedaŭrinda stato ni ne povas ne diri ankoraŭfoje, ke ni ĉiuj, precipe la spertintoj de la militteruraĵoj, estas firmaj apogantoj de paco, sed certe ne de "paco" simila al tiu de sovaĝaj bestoj en ŝtalaj kaĝoj de zoologiaj ĝardenoj, aŭ de enkarcerigitoj en malliberejoj. Ni estas por paco en libereco kaj por libereco en paco kun respekto al la homaj rajtoj laŭ la ideoj de la Manifesto 77 de la Esperanto-Movado kaj konforme al art. 4 de la Statuto de UEA, ne nur tial, ĉar libereco estas per si mem almenaŭ egalvalora al paco, sed ankaŭ tial, ĉar ĝi estas antaŭkondiĉo de vera paco. Kiam en 1941 la registaro de Jugoslavio aliĝis al la nazia Tripartia Pakto, la 27-an de marto de tiu jaro la demokrata jugoslavia junularo amase inundis la stratojn kaj placojn por demonstracii sub la slogano "*bolje grob, nego rob*", t.e. "prefere morto ol sklavsorto". Poste ĝi ankaŭ agis konforme. La koncepto koncize esprimita en la slogano de la tiama demokrata jugoslavia junularo restas valida por ĉiuj sinceraj pacamaj kaj liberecamaj homoj.

Tiom pri paco kaj "paco" en ligo kun la partipolitikaj agadoj de parto de la nuna UEA. Kaj oni ne riproĉu, ke ankaŭ ni "politikumas", ĉar, unue, ni ĉiam nur reagas je la partipolitikaj agadoj en UEA kaj, due, niaj reagoj troviĝas plene en la kadro de la principo de aktiva neŭtraleco, kiel formulita en art. 4 de la Statuto de UEA, laŭ kiu la respekto de la homaj rajtoj estas "esenca kondiĉo" por ĝia, nun nia, laboro.

PARTOPRENO EN PARTIPOLITIKA PERSEKUTO

Nun okazis nova hontinda ago, pri kiu ni informas en ero 22 de la rubriko ED en tiu ĉi numero de *Horizonto*. Ne temas nur pri tio, ke du esperantistoj estas kontraŭleĝe

persekutataj de la ŝtata prokuroro pro "krimo", kiu konsistas el realigo de unu el la fundamentaj homaj rajtoj, konkrete en ege modesta kaj diskreta formo, dum aliaj esperantistoj estas ĉiel ĉikanataj, sed ankaŭ pri la nekontestebla fakto, ke en tiu kontraŭ-homeca persekutado oficiale partoprenas la reprezentantoj de Ĉeĥa Esperanto-Asocio (ĈEA), t.e. samtempe ankaŭ de UEA mem. Almenaŭ rilate tiun kazon ne troviĝu unuŝtala sincera kaj intelekta honesta esperantisto — multaj tiaj ankoraŭ troviĝas en UEA — kiu provus elturniĝi per la naivaĵo, ke tio estas afero de ĈEA, ne de UEA. Se ĈEA ne estus aliĝinta asocio de UEA, la skandala hontindaĵo, laŭ nia scio senprecedenca en la historio de la Esperanto-Movado, makulus nur ĝian nomon. Kvankam eĉ la nura ligo de la vorto Esperanto al tiu malnobla ago estas en ĉiu okazo doloriga ŝoko, tamen almenaŭ la nomo de UEA ne estus malpurigita plian fojon. Sed ĈEA estas aliĝinta asocio de UEA, do konsista parto de UEA, kaj tial pro tiaj kontraŭhomecaj kaj kontraŭstatutaj agoj de tia organizaĵo, de ĝiaj oficialaj reprezentantoj, el kiuj unu estas eĉ komitatano A de UEA, respondecas UEA mem kaj ĝia nuna gvidantaro. Kio, do, estus UEA, se ne ĉiuj aliĝintaj organizaĵoj kaj individuaj personoj, el kiuj ĝi konsistas, kiel eksplicite kaj klare difinite en art. 2 de ĝia Statuto? Aŭ, eble, ankoraŭ troviĝas iuj, kiuj kredas, ke UEA kiel tia povas esti neŭtrala en la senco de art. 4 de sia Statuto, se tuta aro da aliĝintaj organizaĵoj, kontraŭe al eksplicita regulo de art. 13 de la Statuto, agas partipolitike malneŭtrale, kaj se la oficialaj reprezentantoj de unu el ili nun eĉ aktive partoprenas, kune kun la reprezentantoj de la politika polico kaj de aliaj partipolitikaj instancoj, en persekutado de honestaj homoj?

Ni lasas la respondon al ĉiuj aliĝintaj politike neŭtralaj Esperanto-organizaĵoj kaj al ĉiuj intelekta honestaj individuaj membroj en la nuna UEA, precipe al tiuj, kies nomoj ankoraŭ troveblas en la listo de Honoraj Patronoj, Honoraj Membroj, ĉefdelegitoj, delegitoj kaj eĉ komitatanoj de la Asocio. La aliĝintaj kaj kunlaborantaj fakaj neŭtralaj kaj neneŭtralaj organizaĵoj, unuavice la religiaj IKUE, KELI, KES kaj BEL povus kaj devus starigi al si mem la demandon kian utilon aŭ malutilon donas al ili la ligo en kiu ajn formo al tia politike kaj etike kompromitiĝinta UEA.

La respondon oni ne direktu al ni, ĉar la starpunkto de *Horizonto* kaj de la tradicia partipolitike neŭtrala Esperanto-Movado estas klara kaj senkompromise firma. Prefere oni sendu sian reagan respondon al la gvidantaro de UEA.

Ivo Lapenna

EL NIA LETER - KESTO ...

Ni danke ricevis

— de EŬROPA KLUBO, landa asocio Rejnlando-Palatinato, de Neustadt (Weinstr.) —

Ni kunlaborantoj kaj simpatiantoj de la Neŭtrala Esperanto-Movado estas konvinkitaj, ke la Neŭtrala Esperanto-Movado (NEM) devas agi kaj entrepreni ĉion, por ke la Universala Esperanto-Asocio (UEA) trovu denove la ĝustan vojon al la absoluta neŭtraleco... Ni dankas al ĉiuj gesamideanoj de la organiza komitato de NEM, kiuj faris la preparlaborojn. Ni dankas al la direktorino Inés Gastón pro la modela redaktado de la revuo HORIZONTO. Ni sendas amikajn salutojn al ĉiuj partoprenantoj de la IV-a Internacia Konferenco de la Neŭtrala Esperanto-Movado (NEM) en Jaca/Hispanujo, kaj deziras agrablajn horojn en amika rondo. Specialan saluton kaj dankon ni esprimas al profesoro doktoro Ivo Lapenna, okaze de la 50-a jaro de lia unika agado por Esperanto; kion vi honorigos en aparta renkontiĝo en Jaca. Salutas la Eŭropa Klubo — Walter Kaukal.

— de RADIO VATICANA, Città del Vaticano —

Dankon pro via n.º 15 de Horizonto. Ĝi estas unu el la plej belaj — se ne la plej bela — revuoj de nia internacia lingvo. Korajn gratulojn! Esperanto-redakcio Jacobitti.

OKCIDENTA EŬROPO (EK) KAJ LA TRIA MONDO

Oni ne povas diskuti la problemojn kaj perspektivojn de Eŭropo neglektante la rilatojn de tiu mondparto al la cetera mondo, kun iliaj ekonomiaj, politikaj kaj kulturaj aspektoj. En la hodiaŭa mondo ekonomia, politika kaj kultura sendependeco ne ekzistas — la decidoj de kiu ajn sendependa ŝtato aŭ komunajo dependas de la cirkonstancoj en la cetera mondo.

Tiu konsciigo pri la reala interdependeco en la mondo ja kondukis al la fondo de la Unuiĝintaj Nacioj kaj kondukas al ĉiam pli da interŝtataj organizaĵoj, ĉu ĝeneralaj, kiel tiuj por ekonomia-politika-komerca kunlaborado, ĉu pli specialaj, kiel tiuj por teknologia kaj humaneca kunlaborado. La mondevoluon gvidas ŝtataj blokoj, kiuj havas komunajn interesojn pro geografiaj, ekonomiaj, politikaj aŭ strategiaj kaŭzoj, ankaŭ parte gvidas la mondevoluon certaj kapitalcentroj neŝtataj, pri kio mi iomete parolas en la fina parto de mia kontribuajo.

En Eŭropo ni devis alkitimiĝi al la realaĵo de dupartigita Eŭropo, tiu de okcidento kaj oriento. La olekrizo, kun siaj politikaj implikaĵoj lige al la mezorienta konflikto, kondukis al la intereskomunajo de la oleeksportantaj landoj, OPEC (Organisation of Petroleum Exporting Countries), nova potenca konstelacio de evolulandoj. Jam en 1961 fondiĝis OECD (Organization for Economic Cooperation and Development) por establi permanentan kunlaboradon kaj stimuli rapidan kaj kiel eble plej sanan ekonomian evoluadon en la memrolandoj, sed ankaŭ en nemembraj landoj. Memrolandoj estas la nesocialismaj landoj en Eŭropo, krome Usono, Kanado kaj Japanio; Jugoslavio asociiĝis per aparta interkonsento. Lige kun la fondiĝo de OECD oni starigis Komitaton por teknika evoluasistado, DAC (Development Assistance Committee), en kiu la memrolandoj povas interŝanĝi spertojn koncerne al helpo al la evolulandoj. La memrolandoj de DAC hodiaŭ kontribuas la grandan pliparton de la mondtotala ekonomia kaj teknika helpo al la evolulandoj. Aŭstralio kaj Novzelando aliĝis al DAC, sed ne Jugoslavio.

Laŭ akceptita interkonsento inter la industrilandoj, ĉiu lando sin devigas por kontribuo al la evolulandoj konforme al la ekonomia stato de la unuopa kontribuanta lando, t.e. ĝia ĝenerala ekonomia kapablo tiurilate. Tiu kapablo estas esprimita per ĝia brutta naciprodukto, la ĉiujara po-individua enspezo. La Asembleo de la Unuiĝintaj Nacioj decidis en 1970, ke la riĉaj landoj je la fino de tiu ĉi jardeko devas atingi la nivelon de ŝtata evoluhelpo, egala al 0,7 % de la brutta naciprodukto de ĉiu lando. Kelkaj eŭropaj landoj, Nederlando, Norvegio, Svedio, jam pasis tiun nivelon, Danio verŝajne plenumos tiun promeson en 1979. Aliaj eŭropaj landoj bedaŭrinde ne atingos tiun celon laŭ la plano, precipe kelkaj en la plej grandaj industrinacioj. Post premo flanke de la evolulandoj dum la Pariza konferenco pri internacia ekonomia kunlaborado, CIEC (Conference on International Economic Co-operation), ankaŭ nomata la Nord-Sud-dialogo, kiu okazis de decembro 1975 ĝis junio 1977, tiuj industrilandoj, kiuj restis malantaŭe, sin devigis kreskigi esence sian evoluhelpon en la venontaj jaroj. Inter la industrilandoj, kiuj tiel postrestas en la evoluhelpo estas Britio, Federacia Germana Respubliko kaj Svisio.

Per la formiĝo de la Eŭropaj Komunajoj intensiviĝis eŭropa koordinado de la ekonomia-teknika kunlaborado kun la evolulandoj. Estas la definitiva politiko de EK subteni prefere la plej malriĉajn landojn de la Tria Mondo. Jam lige al la Rom-traktato de EK oni en speciala konvencio fiksas regulojn pri la interrilatoj inter EK kaj la tiam ankoraŭ dependaj koloniaj landoj, kaj la sendependiĝo de 18 afrikaj landoj kaj Madagaskaro en 1960 kaj 1962 kondukis al la Unua Yaoundé-konvencio validiĝinta por 5-jara periodo; ĝin sekvis la Dua Yaoundé-konvencio, kiu validis por 4-jara periodo. Poste okazis plivastiĝo de la kunlaborado, kun pli da afrikaj landoj, kiuj sinsekve asociiĝis.

La plej ampleksa organiziĝo de kunlaborado inter EK kaj la plej malriĉaj landoj okazis per la subskribo de la Lomé-konvencio. Ĝi estas interkonsento inter EK kaj 53 (origine 46) evolulandoj, la t.n. ACP-landoj, farita en februaro 1975 en Lomé, la ĉefurbo de Togo. Ĝi anstataŭigas la Yaoundé-konvencion. ACP (African, Caribbean and Pacific Countries) estas landoj en Afriko kaj la Kariba kaj Pacifika regionoj. La konvencio havas funkciperiodon de 5 jaroj kaj inkludas komercajn interrilatojn, kaj financon kaj industran kunlaboradon. Per la konvencio la evolulandoj ricevas preskaŭ liberan aliron al la eŭropa merkato — tiu libereco validas por la tuta industri-eksporto kaj por 84 % de la agrikultura eksporto el tiuj landoj. La konvencio plue donas garantian kontraŭ tiuj reduktoj en la prezoj de krudmaterialo kiuj okazas sur la mondmerkato; la garantio efektiviĝas per speciala fondaĵo (Stabex-fondaĵo); plue ĝi garantias evoluhelpon pere de la Eŭropa Evolufondaĵo, EDF (European Development Fund), kaj fine ĝi provizas por pruntoj pere de la Eŭropa Investbanko, EIB (European Investment Bank). La 62 Lomé-landoj formas la plej grandan organizaĵon por libera komerco en la mondo.

La kunlaborado de EK kun evolulandoj ne estas limigita al la evolulandoj sub la Lomé-konvencio, sed ankaŭ direktiĝas al aliaj landoj, precipe al la plej malriĉaj evolulandoj en Azio, kiel Hindio, Bangladeŝo kaj Pakistano. En kunsido de la evolulinistoj de EK en novembro 1977 oni decidis fiksi koordinadon en tiu evoluhelpo kaj interkonsentis pri ĝeneralaj agadprincipoj. Oni decidis direkti la helpon al la plej malriĉaj landoj, kaj ĉefe al la plej malriĉaj populacigrupoj en tiuj ĉi landoj. Oni precipe volas evoluigi la kamparanajn distriktojn, stimuli la nutraĵproduktadon, kaj kiel ĉefa regulo, la helpo estos en formo de donacoj. En Konsilantara kunsido de la evolulinistoj la 25-an de aprilo 1978 EK decidis kontribui al la dua fazo de granda hinda projekto (Flood 2), kiu celas plibonigi la vivkondiĉojn por 10 milionoj da laktoproductantaj kamparanaj familioj, konsiderante en la projekto pliefektivigon de la laktoproductado kaj plibonigon de la ĉiutaga dieto per konforma aldono al ĝi de lakto kaj laktoproductoj. La projekto antaŭvidas kreon de distribusistemo, kiu kovros 100 urbojn kaj loĝantaron de 150 milionoj. EK kontribuas por tiu celo 270 milionojn da dolaroj. En 1978 oni disponigas al la hinda registaro kiel parton de tiu projekto 31.000 tunojn da laktopulvoro kaj 31.000 tunojn da buteroleo. La Konsilantara kunsido cetere fiksis certajn ĝeneralajn direktivojn por la agado direktita al la landoj neasociiĝintaj al la Lomé-konvencio. Oni asignas en 1978 sumon de ĉ. 90 milionoj da dolaroj (unu trionon pli ol en 1977) por la helpo al tiuj landoj, el kiuj 75 % por la plej malriĉaj landoj en Azio, 20 % por la plej malriĉaj landoj en Latinameriko, kaj 5 % por tiaj landoj en Afriko.

Aparta problemo estas la politika sinteno de EK al la eventoj en tiuj evolulandoj, kiuj montras malrespekton al la Homaj Rajtoj kiel difinitaj en la Carto de la Unuiĝintaj Nacioj. En la kunsido de la EK-ministoj por eksterlandaj aferoj en majo 1978 pri la venonta Lomé-konvencio (la nuna funkcias ĝis la 1-a de marto 1980), oni diskutis la eblojn enmeti en la novan konvencion, kiel kondiĉon por akcepto de memrolando, la sindevigon respekti la Homajn Rajtojn. Oni venis al la konkludo, ke tia eksplicite formulita regulo ne vere servus la celon, ĉar tia limigo de la kontrakto trafus ĝuste la populaciojn mem de la concernaj landoj, kaj efektive nur kontribuas al plia suferigo de tiuj homoj, kiuj jam suferas pro neplenumo de la Homaj Rajtoj. Tio rilatas ekz. al la cirkonstancoj en Ugando. EK tial postulos, ke estu enmetita en la Preamblon de la renovigota konvencio, ke la principoj de la Homaj Rajtoj de UN devas esti observataj. Fakte ambaŭ partoj ja ilin agnoskas.

Entute, se la problemoj pri kunlaborado inter EK kaj la evolulandoj sin limigus al pure teknika-ekonomia asistado por evoluigo de tiuj landoj, ĝi estus multe malpli komplika ol ĝi vere estas. Eĉ se principe koloniismo kontraŭas al la idealoj de la Unuiĝintaj Nacioj, kiel eksplicite formulita en rezolucio de ĝia Asembleo en 1960, kaj eĉ konsiderante ke iom post iom la rekta politika kaj militpotenca regado ĉesis per la sendependiĝo de la antaŭaj kolonioj, tiu evoluo de formala sendependiĝo ne reale ĉesigis la koloniismon.

Partoj de la Tria Mondo estas objekto de novkoloniismo flanke de grandaj kapitalcentroj en Usono kaj Okcidenta Eŭropo. Tio baziĝas sur kunlaborado inter tiuj ĉi centroj kaj la supera klaso en la concernaj landoj. Kun asistado de tiu supera klaso la ekspluatado de la resursoj⁽¹⁾ de tia lando daŭre okazas sub kovro de ĝia formala politika sendependeco. Ilustran ekzemplon donas la lastatempaj okazaĵoj en Zairo, la antaŭa Belga Kongo.

Hodiaŭ, 18 jarojn post sia sendependiĝo, tiu lando kaj ĝia prezidanto Sese-Seko Mobutu, daŭre estas lasitaj al privataj belgaj kapitalintereso. Mobutu naciigis en 1966 la belgan minadkompanion Union Minière, kiu fariĝis Gecamines. Kvankam ĝi hodiaŭ havas zairanon kiel direktoron, kaj kvankam la tuta akcikapitalo estas notita en Kinŝaso, la kompanio estas sub plena kontrolo de la malnova Union Minière pere de la 'holding'-kompanio Société Générale des Minerais (holding-kompanio estas kompanio, kiu ne mem produktas nek faras komercon, sed kiu posedas akciojn en komercaj entreprenoj kaj tiamaniere kontrolas iliajn aktivecojn. La belgaj bankoj regas la monprovizojn de la lando. Du trionoj de la kupromineralo el la Shaba-provinco estas prilaborataj en la giganta fabriko Hoboken-Overpelt en Antverpeno, posedata de Société Générale. Tial la plimulto de la blankuloj en Kolwezi, la celo de la Katango-ribelo en majo ĉi-jare, estis belgoj, ĉ. 1200 — en la cetera Zairo troviĝas aliaj 25.000 belgoj. La Shaba-provinco estas nro 6 en la mondo kiel produktanto de kupro, kaj ĝi estas la plej granda produktanto de kobolto, 15.000 tunojn ĉiujare. Ekzistas aliaj gravaj mineraloj en la provinco, i.a. urano, kadmio kaj industridiamantoj. La Katango-ribeluloj el la liberiga movado F.L.N.C. (la nacia angola liberiga fronto) celis okupi la minojn ĉe Kolwezi por tiel forigi la ekonomian bazon de la Mobutu-registaro, kiu ĝuste nun troviĝas en grava ekonomia krizo. Por sin savi el ĝi Mobutu serĉis internacian bankrunton de 250 milionoj da dolaroj. La prunto estis subskribota ĝuste kiam la ribeluloj de Nathanael Mbumbas enpenetris Kolvezion. Oni devas vidi la sukcesan intervenon de la francaj fremdlegianoj en la lumo de la francaj kapitalintereso en tiu mineralriĉa lando. Giscard d'Estaing proponis starigi fondaĵon de unu miliardo da dolaroj per kunlaboro inter Usono, Francio, Britio, Okcidenta Germanio kaj Belgio por subteni projektojn en "amikaj" afrikaj landoj, unue por havigi al ili ŝoseojn kaj fervojojn kondukantajn al la marbordo por transportado de krudmaterialoj, kaj due por pliintensigi minekspluatadon — kaj, ni aldonu, por plia influo de Francio en la mineralriĉa Afriko!

En majo 1978 la EK-ministroj por eksterlandaj aferoj klopodis fari ian decidon pri la politiko por Zairo, nefacila tasko. Kion fari pri la korupta reĝimo de Mobutu, la bankrota situacio de la lando, kaj la minacoj de pliaj ribeloj?

La franca proponita plano pri komuna afrika armeo, organizita el Eŭropo, estis ne-realisma. Ne estas la tasko de EK organizi armeojn. Se oni volus fari komunan afrikan armeon por sekurigi pacon en kazo de ribeloj, tio devus nepre okazi pere de OAU, la Organizaĵo por Afrika Unueco. La EK-ministroj interkonsentis pri helpo al la detruita ekonomio de Zairo, kiu estas membro de la Lomé-konvencio. Ŝajne estos necese, ke Mobutu, aŭ lia posteulo, estu metita sub administracion, kaj certe estas necese ke li serĉu realismajn politikajn interkonsentojn kun siaj najbaroj, Angolo kaj Zambio.

La evolulandoj ne nur estas viktimo de postrestinta evoluo, sed ankaŭ de rekta ekspluatado de supera klaso en kunlaboro kun kapitalinteresoj en la industrilandoj. Antaŭ la koloniisma periodo dum feŭdismaj registemoj riĉaĵoj ja ankaŭ amasiĝis en malmultaj manoj precipe en aziaj landoj. Nun svisa sciencisto, profesoro kaj socialdemokrata parlamentano Jean Ziegler, povis informi, ke gigantaj sumoj venadas el evolulandoj al la tre diskretaj bankoj de Svislando kiel bonhavo de la estroj de la supera klaso de militjuntaj kaj koruptaj reĝimoj. Li mencias la totalsumon de 250 miliardoj da dolaroj tiel akumulitaj en svizaj bankoj kaj diras pri ili: ŝtelitaj je la kosto de la malriĉaj popoloj en evoluantaj landoj. Tiu ĉi kunlaboro inter kapitalinteresoj de unuopuloj en evolulandoj kaj kapitalfortaj kompanioj kaj bankoj en Eŭropo kaj aliloke en "nia" mondo, ankaŭ apartenas al realisma bildo de Eŭropo en ĝia rilato al la Tria Mondo. Tiaj unuopuloj estas ekz. homoj kiel generalo Videla, Argentino; generalo Pinochet, Ĉilio; imperiestro Haile Selassie, Etiopio; generalo Nguenyn Cao Ky, Sudvijetnamo; prezidanto Idi Amin Dada, Ugando, kaj prezidanto kaj ĉefministro Mobutu, Zairo.

Estas en la vitala intereso de Eŭropo daŭre efektiviĝi kaj plukonstrui komercajn kaj teknologiajn rilatojn kun la Tria Mondo. Same gravaj estas politikaj rilatoj bazitaj sur reala respekto al la sendependeco politika, kaj ankaŭ kultura, en tiu mondo. Tial ankaŭ estas tasko de la demokratia, sed ja kapitalisma okcidenta Eŭropo kontroli kaj bridati la aktivecojn de la ekzistantaj kapitalcentroj (kaj de similaj ekonomiaj potencoj) tiel kiel ili agadas en la antaŭaj kolonioj, por efektive bremsi kaj finfine ĉesigi koruptadon kaj la ĉiam konfliktgravedan novkoloniismon.

(1) *resursoj*: fontoj de provizoj.

LA E. E. K.¹ FARIĜIS BABEL - TURO...

Laŭ informo de "A.F.P." (2) (el Bruselo) Eŭropo, kiu, jam parolante ses lingvojn (sen la gaela), baldaŭ parolos naŭ lingvojn post la plivastiĝo de l'komuna merkato, tiel fariĝos vera Babel-Turo.

Nenia komuna lingvo estis antaŭvidita, kaj la problemoj estas tiel dornoplennaj, ke la komunaj instancoj ankoraŭ ne kuraĝis alfronti ĝin. La franca, la angla, la germana, la itala, la nederlanda kaj la dana estas nuntempe uzataj en la komunaj institucioj. Post la eniro de Grekio, Portugalio kaj Hispanio en la komunan merkaton la "Eŭrokratoj" (3) de Bruselo devos paroli naŭ lingvojn.

Nu la Eŭropa Komisiono jam havas la plej grandan traduko— kaj interpreto-servon en la mondo: 790 tradukistojn por skribaj dokumentoj kaj 340 interpretistojn por la parolaj lingvoj. Krome ĉirkaŭ 10 % de la traduko-laboro kaj pli ol 23 % el la ĉirkaŭ 76.500 interpreto-tagoj (jare efektiviĝitaj por la komunaj institucioj de Bruselo) estas faritaj de sendependaj poliglotoj. La tuta kosto estas taksita de la Komisionaj servoj je 2,2 miliardoj da belgaj frankoj (308 milionoj da francaj frankoj) jare, tio estas 25 % de la funkcia buĝeto de l'Komisiono kaj 1 % de la buĝeto de E.E.K. En la Komisiono ĉirkaŭ unu persono el kvar estas tradukisto aŭ interpretisto!

Ne estas facile trovi interpretistojn kapablajn traduki el la itala ekzemple en la nederlandan kaj estas manko de danaj interpretistoj. La Komisionaj interpretistoj laboras ankaŭ por la Konsilio de l'Ministroj en Bruselo samkiel por la Ekonomia kaj Sociala Komitato. La homoj komisiitaj atribui ĉiusemajne la interpretistojn en la diversajn kunvenojn (laŭ la lingvoj de ili kompreneblaj kaj paroleblaj) devas realigi akrobatajn mirindaĵojn, eĉ se ilia servo ekestas laŭparte informadikita.

En la perspektivo de l'plivastiĝo — kiam ĉiu el la naŭ lingvoj devos esti tradukita en la ok aliajn — 72 interpretistoj (se ĉi tiuj parolas nur sian lingvon) devos esti dungitaj por ĉiu kunveno. S-ino Renée van Hoof, kiu estras jam de 1958 la interpreto-servon de la Komisiono kun tia kompetenteco, energio kaj eĉ "mastreco", kian neniu malkonsentas al ŝi, opinias, ke "la aldono de la hispana, greka kaj portugala kiel laborlingvoj estas tia, ke — se ĉiu lingvo devus esti tradukita en alian — ĝi plene paralizus la bonan funkciadon de la Eŭropaj Institucioj".

S-ino van Hoof rimarkigas, ke la ĝeneraligo uzi "relajson" (ekzemple interpretadon de la greka en la anglan, poste de la angla en la nederlandan anstataŭ rekta interpretado de la greka en la nederlandan) sekvigis kvalito-falon kaj igus certajn debatojn nekompreneblaj. Dum ŝi estis forte akuzita, ke ŝi volas forigi la "etajn" lingvojn, nome la danan, s-ino van Hoof nepre deziras substreki, ke ŝi opinias, ke ĉiu oratoro devas paroli en sia gepatra lingvo. Sed ŝi sugestas, ke la traduko de ilia lingvo en du aŭ tri ĉefajn lingvojn (anglan, francan kaj eĉ alian) estu certigita almenaŭ por la ordinaraj kunvenoj. Dum la tre solenaj kunsidoj la interpretado povus esti farita de la naŭ lingvoj en la naŭ lingvojn.

Ĝis en 1973 la franca superregis en la Komisiono, sed de tiam la angla progresis (estas 62 interpretistoj francofonaj⁽⁴⁾, 71 anglofonaj, 65 germanofonaj). La germanoj, kiuj apartenas al la "unua ekonomia potenco" de Eŭropo, ekhavas el tio ian ĉagrenon. La italoj siaflanke substrekas, ke ili venis, antaŭ ol estis necese paroli angle. La problemo estas tiel brula, ke ŝajne la komunaj instancoj rifuzas alfronti ĝin malkaŝe. La dokumento de la Komisiono dediĉita al la plivastiĝo precize deklaras simple, ke necesas "*studi la demandon*". Dum la pripensada semajno-fino de la Komisiono, kiu okazis en Comblain-la-Tour en pasinta septembro, s-ro Christopher Tugendhat, komisaro pri la buĝetaj demandoj, devis legi raporton pri tiu problemo. Sed la mon-aferoj forpelis la punkton el la tagordo.

Necesis dudek jaroj por ke la Komisiono faru malaŭdacajn proponojn en la Konsilio por plivastigi la fremdlingvan instruadon en la E.E.K.; kaj tio atestas la fakton, ke de la patroj de l'komuna merkato la ambicio krei veran komunaĵon kaj eĉ unu eŭropan konscion ankoraŭ ne sukcesis.

—oOOo—

Ja krom la ĉi-supra teknika traduko — kaj interpreto-problemo, je kiu sin limigas la informo de "A.F.P.", jam de longe pri la bezonoj de la kultura Eŭropo klara estas la pozicio de la Esperanto-movado.

Eŭropo formiĝas el nacioj, kiuj prezentas ĉiuj unu kulturalan identecon propran kaj naskitan de longa tradicio; kio konsistigas eŭropan riĉecon. Tiuj propraj kulturaj identecoj interalie esprimiĝas per apartaj lingvoj prezervindaj kontraŭ "kontaminado"⁽⁵⁾ sub la superregado de unu el ili des pli danĝera, ke la inform-rimedoj fariĝis plej potencaj.

La "frangla" efektive, sed ankaŭ la "germangla", la "dangla", la "italgla", ktp. jam ne montriĝas kiel estontaj solvoj, ĉar ili substituas al la antaŭa novan Babel-Turon, kiun jam de 1964 denuncis profesoro Etiemble per sia sensacia libreto: "*Cu vi parolas frangle?*".

Nur Esperanto permesas respekti la kulturajn identecojn per la respekto mem de iliaj esprimiloj kaj la estiĝo de "*eŭropa konscio*", kiu — sen sufoko de la kultura diverseco — progrese ebligas unu esprimadon de l' "*komunaj punktoj*".

Tiucele Esperanto montras jenajn nemalhaveblajn valorojn.

La lingvo eltiras siajn leksikonajn radikojn en la trezoro de l' hindeŭropaj lingvoj: *pa-*, radiko signifanta nutri, kaj *-tr-* sufikso indikanta aganton, naskis la vortojn: *pater*, *padre*, *father*, *Vater père*, kto. *patr/o*.

La spirito de la lingvo estas farita el simpleco, sekve malfermita al ĉiuj; — el spleco, aparte pri ĝia sintakso, kiu igas ĝin ideala tradukilo de neimitebla fideleco; — el homa solidareco, kiel ĝin manifestas originala beletro inspirita el la latina poeto Terencio: "*Homo sum: humani nihil a me alienum puto*".

Se ĉiu homo havas sian "*etan patrolandon*" familian kaj lokan kaj sian "*grandan patrolandon*" nacian ĉar respondantan al lia intelekta edukado, estas tempo, ke li fine malkovru unu pli vastan "*idealan patrolandon*" en la etiĝinta planedo "tero", kie laŭ la frapvortoj de l'poeto Paul Claudel la patrio estas "*la maro kaj la vivantoj*". Ĉar, kiel diris Jean Jaurès, "*Iom da internaciismo fremdiĝas al la patrio; multe da internaciismo rekondukas al ĝi. Iom da patriotismo fremdiĝas al la internaciismo; multe da patriotismo rekondukas al ĝi*".

Jean Thierry

(1) E.E.K. — Ekonomia Eŭropa Komunaĵo.

(2) «A.F.P.» — Agence Française de Presse (Franca Gazet-Agentejo) — komunikaĵoj de Anne Vahl en la 15-a de oktobro 1978.

(3) «Eŭro-krato», vorto forĝita el Eŭro(po) kaj la greka elemento -krato (kiel en demo-krato, aristo-krato, ktp...).

(4) «francofonia» — denaske parolanta la francan.

(5) «kontaminado» — amalgamaj fenomenoj ŝulditaj al kontaktoj inter du aŭ pluraj fremdaj lingvoj.

NEŬTRALECO KAJ HUMANECO

(Inaŭgura Parolado de Prof. I. Lapenna en Jaca)

Sinjoro Urbestro, Sinjoroj Rezentantoj de la Ministro de Kulturo kaj de la Universitato Rektoro, Sinjoro Prezidanto, Karaj Konferencanoj!

Kiam la 3-a Konferenco de la Neŭtrala Esperanto-Movado ricevis proponon okazigi la 4-an Internacian Konferencon en Jaca, ni ne hezitis unu solan momenton, sed kun granda entuziasmo akceptis la inviton, ĉar ni estis certaj, ke la 4-a Konferenco estos el ĉiuj vidpunktoj eĉ pli sukcesa ol estis la antaŭaj. Tion garantiis la tre konvena situo de la urbo Jaca — relative malgranda laŭ la nombro de loĝantoj, sed granda laŭ sia eventoplena historio, markita de kuraĝo kaj nobleco. Tion garantiis la konata gastamo de tiu ĉi regiono, de Aragono, kaj de la tuta hispana popolo, kiu donis tiom da valoroj al la multfaceta kulturo de Eŭropo kaj tra ĝi al la monda kulturo: de tiu Hispanio, glora en sia historio, kiu feliĉe retrovis sin mem. Fine, sed ne laste laŭ la graveco, tion garantiis la klereco kaj la sindono de la invitintoj ĉepinte kun nia eminenta scienculo kaj humanisto Profesoro D-ro Sancho Izquierdo — kaj mi ne povas ne diri, ke mi fieras ĝui lian personan amikecon — kaj la aliaj membroj de la Organiza Komitato, kies animo kaj koro estis F-ino Inés Gastón, multe helpata de sia fratino, F-ino Emilia Gastón.

Ni ne eraris. Ni ĉiuj konstatas, ke ĉi tie ni spiras freŝan kaj puran aeron, ĝuas la sunon kaj la bluan de la ĉielo, dum en la fono, sur la rokaj altaĵoj de la Pireneoj brilas la brilanta blanko de eterna neĝo. Ĉio ĉi — la freŝeco kaj pureco, la roka firmeco, la lazuraj perspektivoj sunumitaj — iusence simbolas kaj inspiras la celojn kaj idealojn de la tradicia Esperanto-Movado, de tiu Esperanto-Movado, kiu nun ĉefe esprimiĝas tra la Internaciaj Konferencoj de la Neŭtrala Esperanto-Movado, kaj tra la kultura kaj informperiodaĵo *Horizonto*, kompetente redaktata de eminenta redakta komitato sub la direktoreco — ankoraŭfoje mi devas menciigi la saman nomon — de F-ino Inés Gastón.

Ni dankas al Lia Ekscelenco S-ro Pío Cabanillas Gallas, Ministro pri Kulturo, al la Rektoro de la Universitato de Zaragoza kaj, antaŭ ĉio, al Lia Moŝto la Urbestro de Jaca, al ĉiuj landaj kaj lokaj aŭtoritatoj, kiuj donis helpon al la Organiza Komitato kaj sekve al ni ĉiuj, por ke la Konferenco estu plensukcesa. Ni ŝuldas grandan dankon — kaj mi kredas, ke mi esprimas viajn pensojn kaj sentojn, se mi tion diras — al la Organiza Komitato, kiu ebligis, ke ni kunvenu ĉi tie en Jaca, ke ni havu la nunan solenaĵon en ĝia belega urbodomo, kaj ke ni konferencu en tiu moderna, unu el la plej modernaj palacoj de kongresoj. Koran dankon al ĉiuj.

—oOO—

Kiel vi scias, nia Konferenco pritraktos du ĉefajn temojn. La unua estas "Eŭropo Hodiaŭ: Kulturaj kaj Politikaj Aspektoj", kaj la alia estas "Neŭtraleco kaj Neŭtralismo".

La unua temo estas gravega en la nuntempa Eŭropo. Sufiĉas pasi de unu lando al alia por tuj eksenti la lingvodiversecon kiel baron, kiel malhelpon al komunikado. Nenie en la mondo sentiĝas la lingva problemo tiel forte, kiel en Eŭropo. La kvintesenco de tiu problemo konsistas en tio, ke, unuflanke la nacioj historie formiĝis kaj evoluis, ke ili estas nek neglekteblaj, nek ignoreblaj, ke ili estas socia realaĵo. Unu el la karakterizoj de ĉiuj nacioj kaj etnoj estas la lingvo. La nacia lingvo estas la identigilo de la nacio kaj de la etno. Sen la lingvo la nacio aŭ etno perdas sian memon, sian ekziston. Neniu nacio de Eŭropo, nek kiu ajn nacio de la mondo, estas preta rezigni pri sia memo, eĉ ne en la intereso de monda komunikado. Neniam la hispana popolo akceptis, ke aŭ la franca, aŭ la angla, aŭ la germana, aŭ la itala, aŭ kiu ajn alia nacia lingvo estu la sola lingvo de internacia komunikado, same kiel neniam la franca, angla, germana, aŭ kiu ajn alia popolo akceptos, ke kiu ajn fremda nacia lingvo havu tiun rolon.

Ni, do, troviĝas en situacio, ke la nacioj kaj naciaj lingvoj estas socia realaĵo, sed ke, aliflanke, la grandioza progreso de teknologio kaj la ekonomia interdependeco de la mondo puŝas la homaron al amasaj kontaktoj kaj, en kelkaj mondopartoj, al integriĝo: ne tia integriĝo, ke unu nacio superregu la aliajn, sed integriĝo en justeco kaj egalrajteco. Do, ni havas du fenomenojn, du sociajn faktojn: unuflanke la nacioj kun siaj naciaj lingvoj, pri kiuj ili ne pretas rezigni; aliflanke, la bezonoj de komunikado. Tiun problemon, laŭ ni, povas solvi nur neŭtrale homa lingvo, la Internacia Lingvo, nia Esperanto.

Dirinte tion, mi samtempe tuŝis la duan temon, nome la demandon de neŭtraleco kaj humaneco. Temas pri tio, ĉu neŭtraleco, partipolitika neŭtraleco, estas akordiĝebla kun la principo de humaneco, de humaneca internacismo. Due, temas pri tio, ĉu la ligiteco

de humaneca internaciismo al Esperanto ekde kiam Zamenhof donis al la homaro sian lingvoprojekton, kiu transformiĝis en vivantan lingvon, ĉu tiu ligiteco estas science korekta, jes aŭ ne. Ĉu, do, Esperanto estas objektivite ligita al humaneca internaciismo, jes aŭ ne? Ĉu ni povas libere diri: ni forjetu la humanecon, por ke Esperanto pli bone progresu, aŭ, forjetante la humanecon, ni per tio detruas kaj la humanecan internaciismon kaj Esperanton. Pri tio temas.

Ni priparolos la demandon en prelegoj kaj diskutoj, sed mi deziras tuŝi en tiu ĉi inaŭgura paroladeto almenaŭ la kvintesencon de la afero. Por komprenigi tiun ĉi kvintesencon mi ne povas ne memori, ke la nacioj kaj la naciaj lingvoj ne estas iaj eternaj fenomenoj. Ili estas historie kondiĉitaj. Ili ekestis en difinitaj sociaj cirkonstancoj kaj fariĝis realaĵo. Sed ankaŭ la Internacia Lingvo ekestis en difinitaj historiaj cirkonstancoj kaj fariĝis realaĵo. Same kiel ĉiu nacia lingvo estas ligita al la nacio, tiel same la Internacia Lingvo estas ligita al la homaro, al la ideo de tuthomeco. Kaj same kiel ĉiu nacia lingvo servas ne nur por komunikado interne de la nacio, sed estas io multe pli, ĉar ni ĉiuj estas ankaŭ emocie litigitaj al niaj naciaj lingvoj, ni amas ilin, ni ne pretas rezigni pri ili, tiel same ni estas ankaŭ emocie litigitaj al Esperanto. Do, ĉiu lingvo havas ankaŭ sian idean aspekton. Sed dum la naciaj lingvoj havas sian nacian idean aspekton, la Internacia Lingvo havas sian propran, internacian idean aspekton, esprimiĝantan en humaneca internaciismo.

Kiam Zamenhof, ankoraŭ kiel gimnaziano, intuicie sentis, ke komuna lingvo por internacia komunikado kun la respekto por ĉiuj naciaj lingvoj, estas io, kio havas ankaŭ idean aspekton; kiam li verkis la unuan poemeton en la praprojekto de Esperanto, en kiu li diris "malamikajoj inter la nacioj falu, falu jam estas tempo" kaj poste, dum sia tuta laboro kaj dum sia tuta vivo, agis konforme, per tio li ligis al Esperanto — eble nur intuicie, sed genie — profundan humanecon, ĉar li komprenis, ke sen humaneco Esperanto estas senenca. Estis, geamikoj, ĉirkaŭ 800 projektoj de komuna lingvo ekde Leibniz ĝis Zamenhof. Ili amasiĝadis paralele kun la kreskantaj bezonoj internacie kontaktadi. Ju pli evoluis la nacioj, ju pli ili fermiĝis en la kadroj de siaj propraj naciaj lingvoj, des pli sentiĝis la bezono por unusola komuna lingvo post la malapero de la latina kiel klasa lingvo. Zamenhof bone komprenis, ke Esperanto estas ligita al humanecaj ideoj, kiujn li nomis "interna ideo" kaj kiujn mi ĉiam — pro kaŭzoj, kiujn ne eblas klarigi ĉi tie — prefere nomis humaneca internaciismo.

Tio estas objektivite, science korekta. Mi akcentas ankoraŭfoje: la sola science korekta ekspliko de la Internacia Lingvo estas la ligiteco de la Internacia Lingvo al humaneca internaciismo. Nur pro tio Esperanto sukcesis, dum la aliaj lingvoprojektoj restis surpaperaj projektoj, neniam transformiĝintaj en vivantajn lingvojn. La fakto, ke hodiaŭ miloj kaj dekmiloj da personoj parolas tian lingvon kaj glate interkompreniĝas per ĝi; la fakto, ke mi povas al vi, apartenantoj de diversaj nacioj, paroli en tiu lingvo, kaj ke vi komprenas ne nur miajn pensojn, sed ankaŭ miajn sentojn, estas pli ol evidenta pruvo, ke la Internacia Lingvo ja transformiĝis en vivantan lingvon de vivanta internacia komunajo, kiu utiligas ĝin por sia internacia komunikado kaj ankaŭ por la evoluigo de humaneco ligita al ĝi. Mi diras al vi — kaj mi tion diras post profundaj studoj de la tuta kompleksa problemaro: se ni senigas la Internacian Lingvon de humaneca internaciismo, ni senigas la lingvon Esperanto de ĝiaj koro kaj animo. Kaj ĉiu lingvo havas siajn koron kaj animon. Nian propran nacian lingvon ni amas kore kaj anime aldone al la komunikado, por kiu ni utiligas ĝin. Se de la naciaj lingvoj oni povus forigi tiun aspekton idean, eĉ emocian, tiam, geamikoj, la lingva problemo tutsimple ne ekzistus. Ĝi certe ne ekzistus, se lingvo estus socie egala al kraĵono, aŭ fontoplumo, aŭ aŭtomobilo, aŭ motorbiciklo, aŭ kiu ajn simila instrumento de komunikado. Guste en tio konsistas la kvintesenco mem de la lingva problemo. La homoj ne volas rezigni pri siaj propraj naciaj lingvoj, sed la homoj, aliflanke, bezonas internacian, neŭtrale homanlingvan komunikilon por la internacia komunikado.

—oOo—

Ni ĉi tie, en la Konferencoj de la Neŭtrala Esperanto-Movado, ne rezignis pri la ideo flanko de la esperantismo. Ni publike deklaras ĝin. Ni fieras pri ĝi kaj ni plu portos la torĉon de la zamenhofa esperantismo, ligita al humaneca internaciismo.

Mi esperas, ke tiu ĉi Konferenco faros pluan grandan paŝon sur tiu vojo, la sola vojo, kiu kondukas al realigo de niaj idealoj kaj celoj: ke iam la tuta Eŭropo, la tuta mondo uzu la Internacian Lingvon kiel duan lingvon, kiel lingvon por internacia komunikado. Kun tiu konvinko mi bondeziras la Konferencon. Mi esperas, ke vi permesos al mi, kiu kvindek jarojn dediĉis al Esperanto, en mia propra nomo deziri al la Konferenco plenan sukceson, por ke ni plu iru laŭ la tradicia vojo, kiu kondukis Esperanton ekde 1887 ĝis la nuna tago al unu atingo post la alia, tiel ke la 4-a Konferenco marku plian mejloŝtonon en nia progresado al la estonteco.

KELKAJ IMPRESOJ PRI LA IV-a INTERNACIA KONFERENCO DE NEM

De Luis M.^a HERNANDEZ YZAL,

La unua impresio estis, ke la Konferenco de NEM estas plene sukcesa; sed estis la malagraba afero de la disiĝo de bonaj esperantistoj en NEM kaj bonaj esperantistoj en UEA. Post la ferma parolado de Profesoro Doktoro Ivo Lapenna la impresio estis ankoraŭ multe pli bona, ĉar li deklaris, ke li estas tute preta pardoni la personajn insultojn kaj ricevitaĵajn atakojn nur kontraŭ la retrovo de la neŭtrala vojo fare de la nunaj estraro kaj komitato de UEA... Ĉu ni povos trovi UEA-anojn pretajn por interveni ĉe la nuna estraro kaj studi "interkonsenton"? (laŭmoda vorto de la nuntempaj hispanaj parlamentanoj en ia ellaboro de la nova Konstitucio).

De magistro Isaj DRATWER kaj magistrino Anna DRATWER,

Ni venis el la malproksima lando Israelo por partopreni la 4-an Internacian Konferencon de la Neŭtrala Esperanto-Movado. Malgraŭ la longa distanco kaj multaj klopodoj ligitaj kun la vojaĝo ni ne bedaŭras tion, ĉar evidentiĝis, ke la Konferenco estis bone organizita kaj enhavoriĉa. Ni ĝojis revidi niajn malnovajn geamikojn kaj konatiĝi kun novaj gesamideanoj. Dankon al la organizintoj de la Konferenco.

De Oton PANCER,

Konferenco kun bona, scienca, kultura, eduka kaj amuza enhavo. Kulpas objektivaj kaŭzoj kaj ne la organizantoj kaj partoprenantoj, ke ne partoprenis pli multnombraj gejunuloj.

De M. H. VERMAAS,

El ekstera vidpunkto: la digno kaj bonstilo de la tuta aranĝo: Kongresejo, Interkona vespero, Inaŭguro, Koncerto, Bankedo, Internacia Somera Universitato. El interna vidpunkto: la eksterordinare alta nivelo de prelegoj kaj diskutoj. El teknika vidpunkto: la mirakla talento de F-ino Inés Gastón organizi kaj laŭbezone improvizi tiamaniere, ke ĉiu problemoj estas ĝustatempe solvita.

De Fernando de la PUENTE,

Krom la agraba Interkona Vespero kun la gajaj "tuna-anoj", frapis mian atenton la entuziasmo de la partoprenantoj de la Konferenco, kiu varmigis ne nur la etoson, sed bedaŭrinde ankaŭ la aeron, kiu ĉirkaŭis nin. Tamen la restado en Jaca estis ĉarma kaj neforgesebla.

De Heinrich MÜLLER,

Ege impresis nin en Jaca la moderna luksa kongresejo, la interesaj prelegoj kun viglaj diskutoj. Sed ni ankaŭ ĝuis la diversajn distraĵojn kiel la koncerton de la orkestro de Zaragoza, la ekskursojn kaj speciale la viziton al via gepatra domo kun multaj antikvaĵoj en pitoreska vilaĝo je la piedoj de la Pireneoj. Entute estis neforgeseblaj tagoj! Certe la faritaj fotoj (diapozitivaj) ankoraŭ ofte ĝojigos nin.

De Joaquín BIELSA,

La influo de la Universitato kaj la sistematiko de la partoprenantaj profesoroj: D-roj Ivo Lapenna; Oton Pancer; Juan Régulo; Miguel Sancho Izquierdo... donis al la diskutoj kaj prelegoj mirindan universitatan etoson, en ordo kaj respekto por ĉies opinioj. La mikso de turismo kaj laboro estis plia instigilo por partopreni en tiuj kunvenoj. Por mi, nova esperantisto, unuafoje partoprenanta en esperantista kunveno tiel altnivela, la partopreno en la IV^a Konferenco de NEM estis ege pozitiva, kaj mia deziro estas ke ni povu pli ofte kaj en sama nivelo organizi tiajn kunvenojn.



Ossip Dymov 1878 - 1959

Okaze de la Zamenhof-tago ni prezentas elĉerpajon el la aŭtobiografio de Ossip Dymov, fama jida kaj rusa verkisto: «Vos iĥ gedenk» (jide: Tio, kion mi memoras). Li naskiĝis en Bjalistoko kaj pasigis tie siajn unuajn 20 jarojn. Tre vivece la aŭtoro enkondukas nin en la atmosferon de tiu urbo. Interesa estas la mencio de «Jatke-Gas», la strato kie Zamenhof naskiĝis. Laŭ li, ĝi estis centra juda strato. Tiamaniere oni povas kompreni, kial ĝi nomiĝis pollingve: «Ulica Zydowska» (Juda Strato). Ciuuj stratoj de la juda urbparto estis alinomitaj post la dua mondmilito. Nur «Lipowa» konservis sian originalan nomon. «Ulica Zydowska» aŭ «Jatke-Gas» ŝanĝiĝis jam en 1919 al «Zamenhof» kaj restis tiel. (Vidu la urbmapon en mia libro «La Kaŝita Vivo de Zamenhof».)

N. Z. M.

BJALISTOKO - MIA PATRINA URBO

Mi naskiĝis en Bjalistoko, la malgranda krono de Litovujo, ĉar la pli granda krono estis ja Vilno. En la tempo, kiam mia vivo komenciĝis, fine de la sepdekaj jaroj de la 19-a jarcento, estis Bjalistoko dividita en du malsamajn partojn. En la centro de la urbo, ĉe stratoj Aleksandrowskaja, Nikolajewskaja kaj Lipowa, loĝis la elito, la inteligentaro; ĉirkaŭ ili — ĉe Gumjener = Gas; ĉe Pjaskes, ĉe Jatke = Gas⁽¹⁾ — loĝis la popolo, la vere juda Bjalistoko.

La inteligentuloj parolis germane, ĉar la germana limo estis proksime, kaj ruse — ĉar la rusa ĉinovnik⁽²⁾ estis pli proksime. Krom tio ili okupis en siaj hejmoj servistinojn, vartistinojn kaj flegistinojn, kiuj parolis pole. La popolo parolis jide kaj sciis hebreu — se ne multon, tamen pli ol la inteligentuloj.

Malantaŭ la urbo etendiĝis la arbaro, nomata «Zverinec», kaj pli malantaŭe — la Pina Arbaro. Kiam ventis, aŭ ŝtormis, parolis la arbaroj sian universalan lingvon, kiu estas la sama en la tuta mondo.

Bjalistoko estas maljuna. 500-jara ĉielo pendas super la urbo kaj ĝiaj arbaroj. La historio havis sufiĉe da tempo kaj spaco por kaprice petoli — jen ĝi parolis litove, jen pole, poste etruske; kaj en ĉiu lingvo, en ĉiu epoko, oni persekutis kaj turmentis la avojn kaj praaĵojn de tiuj judoj, kiuj estis nun la loĝantoj de la stratoj Jatke, la Pjaskes, kaj ĉirkaŭe.

Carma estis la arbaro Zverinec, tiu mistera amiko de mia juneco. Ĝi parolis al mi per la susuro de siaj arboj, per la ĉirpado de siaj birdoj. Ĝi salutis min per siaj verdajoj, per la koloro de modestaj floroj; per la blua ĉielo, kiu rigardis al mi tra la branĉoj de la centjaraj arboj. Iam estis la arbaro — kiel ĝia nomo indikas — plena de sovaĝaj bestoj («Zver» en la rusa signifas besto) kaj la junkroj iris tien por ĉasado. Ili pafis ursojn, lupojn, vulpojn kaj sovaĝajn bovojn.

Forpasis la malnovaj tempoj de Hetmano Branicki, la tiama reganto de Bjalistoko. Restis nur lia bela palaco, kiun judaj manoj helpis konstrui. La palaco

alformiĝis en edukejon, kie lernis kristanaj knabinoj el familioj pli bonstataj, «Institut dlia blagorodniĥ djevic»⁽³⁾.

La hetmanoj kaj la junkroj malaperis kvazaŭ ili tute ne ekzistis. La judoj restis. Ili plukonstruis la urbon paŝo post paŝon, ŝtono post ŝtonon. Tiel elkreskis mia patrino urbo, la malgranda krono de Liĵovo — la loko, kie mi la unuan fojon malfermis miajn scivolemajn okulojn...

La strateto, kie mi naskiĝis, ne havis oficialan nomon — ĝi estis flanka strateto. En Bjalistoko troviĝis multe da tiaj sennomaj stratetoj, ĉar oni ja sciis kien direkti siajn paŝojn. Neoficialan nomon ĝi tamen havis. Oni nomis ĝin «Sneur Gutman's Gesele»⁽⁴⁾ ĉar Sneur Gutman havis tie domon kun korto, kaj kun ĝardeno.

La strateto de Gutman estis proksime al la centro de la urbo. Unu flanko kondukis al Jatke-Gas, la alia flanko — al Nikolajevske, nomata ankaŭ Vaŝlikover-Gas. Ĉe Jatke-Gas, kiel mi jam rakontis, loĝis simplaj, modestaj judoj: metiistoj, etbutikistoj, malpli riĉuloj — la ordinara popolo, la vera Bjalistoko. Ĉe Nikolajevske loĝis la inteligentularo, la pli-malpli klera kasto. Oni aŭdis tie la rusan lingvon kaj la germanan.

Tie kaj pli fore troviĝis la luksaj butikoj, judaj kaj nejudaj, la apoteko de Wilbuschevitz, la vendejo de Muravjov, la klubo (Blagorodnoje Sobranje)⁽⁵⁾. Tie loĝis la kuracistoj — D-ro Bomach, kiu bedaŭrinde estis lama; D-ro Chazanovicz, la juda revulo, kiu estis cionisto antaŭ ol naskiĝis la cionisma movado.

La strateto de Gutman situis — se eblas diri tiel — inter du mondoj: ĉe unu angulo estis la familiara, jud-parolanta «Bjalistok»; ĉe la alia angulo — la «klera», eŭropa urbo, nomata ruslingve «Bjelos-

tok». Nia strateto apartiĝis, kaj samtempe kunligis, tiujn du mondojn.

Kaj ĝuste tie, inter «Bjalistok» kaj «Bjelostok», mi naskiĝis. Hazarde kompreneble, sed ĉi tiu fakto influis min kaj reflektiĝis en mia karaktero kaj mia vivo. Mi estis parto de la sana, firma kerno de Jatke-Gas, kaj samtempe io tiris min al «Nikolajevskaja Ulica», por frandi la sekulara klero, por studi la lingvojn rusan, germanan, francan; por vidi, aŭskulti, ekoni kaj scii — for el la malvasta hejmo en la larĝan, fremdam mondon.

Tio estis ne nur mia aparta vojo. Mi spertis la samon, kion spertis kaj trairis multe da junuloj de mia generacio. La vento de tiu tempo portis min sur siaj flugiloj. Sed — tiel estis nur la unua duono de mia maltrankvila vivo. La alia duono estis la vojo returne: el Rusujo, el la civilizita Eŭropo, kun ĝia tuta brilo — returne hejmen, en la judan Bjalistokon, al la simpla grundo sub la piedoj, al la praa, malnov-juda vivo.

Tion mi retrovis ne nur en la Bjalistoka Jatke-Gas, sed ankaŭ en Vieno ĉe Tabor Strasse; en Berlino ĉe la judeca Oranienburger Strasse; en la Novjorkaj stratoj de East Side, en la Londonaj Whitechapel kaj Golders Green — ĉiuloke ree kaj ree mi trovis la strateton de Sneur Gutman, «kie mia lulilo staris».

El la jida: *N. Z. Maimon*

Rimarkoj de la tradukinto

(1) Jidaj nomoj de tiuj stratoj: a) Gumjener — modifo de ĝia pola nomo: Kupiecka (kupiec = komercisto); b) Pjaskes — aro da stratoj sur sabla tereno (piask = pole: sablo); c) Jatke-Gas-strato de viandbutikoj (pola nomo: Ulica Zydowska).

(2) Registara oficisto.

(3) Instituto por nobelaj knabinoj.

(4) Strateto de Sneur Gutman.

(5) Nobela Klubo.

ABONO AL «HORIZONTO»

Jen nia lasta numero por 1978. Nia deziro estis kaj restas ke la revuo estu plaĉa al vi. Vian jarkotizon por 1979, vi povas pagi rekte al la Administracio aŭ al la perantoj laŭ la listo, kiu aperas en la revuo.

Malgraŭ la devaluto de la peseto kaj pro la alta plialtiĝo de la kostoj en Hispanujo, mi petas ke vi ĉiuj pagu favore al la revuo, saman ĝisnunan kotizon en via respektiva valuto.

Kiu sendos per banko ia ajn pagon al la Administracio de «Horizonto», bv. aldoni 100 pesetojn por kovri la banko-kostojn. Dankon!

Inés Gastón

MIA PENSO

Sur la kampo, for de l' mondo,
antaŭ nokto de somero,
amikino en la rondo
kantas kanton pri l' espero.
Kaj pri vivo detruita
ŝi rakontas kompatante, —
mia vundo refrapita
min doloras resangante.

«Ĉu vi dormas? Ho, sinjoro,
kial tia senmoveco?
Ho, kredeble rememoro
el la kara infaneco?»
Kion diri? Ne ploranta
povis esti parolado
kun fraŭlino ripozanta
post somera promonado!

Mia penso kaj turmento,
kaj doloroj kaj esperoj!
Kiom de mi en silento
al vi iris jam oferoj!
Kion havis mi plej karan —
la junecon — mi ploranta
metis mem sur la altaron
de la devo ordonanta!

Fajron sentas mi interne,
vivi ankaŭ mi deziras,
io pelas min eterne,
se mi al gajuloj iras...
Se ne plaĉas al la sorto
mia peno kaj laboro —
venu tuj al mi la morto,
en espero — sen doloro!

L. L. Zamenhof

Stanislaw SROKOWSKI naskiĝis en Hniicz. — Fariĝinte magistro pri pedagogio kaj pola filologio, li estis instruisto pri la pola lingvo en Stata Mekanika Teknikumo. Nuntempe li loĝas en Wroclaw, kie li laboras kiel estro de kultura fako en la redakcio de grava, semajna revuo «Wiadomości» (Novajoj). — Li eldonis ses poezikolektojn, kaj en la jaro 1976 li debutas kiel romanverkisto per volumo de poezia, psikologia-socia prozo.

Kiel Prezidanto de la Instruista-Verkista Klubo ĉe la Sindikato de la Polaj Instruistoj en Wroclaw kaj la Vrovlava Vojevodio, kaj same kiel redaktoro, li ĉiam favoris kaj plu apogas la esperantan movadon.

Jan Smykalski

XV

plenigo

mi deiris de amikoj
kiuj komencis min kompreni
mi forlasis grandajn urbojn
mi forlasis hejmon
kie duopo da maljunuloj
kliniĝas
super la peco da tero
mi deiris de tia ĝojkampo
kiu kreskis en mia ĉirkaŭaĵo
de tia kamplimo
kiu kuris trans min
kaj plu ĉirkaŭadis
ies
malbonajn okulojn

mi foriris en solecon
por ekmastrumi
per iu favora vorto
vian foreston
mi foriris por malfermiĝi
je ĉiuj antaŭsentoj
estiĝi loko
por plenigo

el la pola tradukis:
Jan Smykalski (Wroclaw)

Rabbi Avraham Even-Ezra
Tudela (Hispanio) 1089 - 1164

Poeto, gramatikisto, ekzegezisto,
filozofo, astrologo, kuracisto

MALBONSORTO

I

Dum naskiĝ' mia regis la konstelacio
Malfavora sur volb' de ĉiel-firmamento;
Se kandelojn-vendist' estus mi laŭ funkcio,
La sunlum' eĉ ne ĉesus por unu momento.

Sen sukces' mi min turnas al faroj kaj verkoj,
Sed perfidis min vojo de astroj en rondo;
Se mi estus vendist' de mortvestoj, aŭ ĉerkoj,
Tiam mortus neniu en tuta la mondo!

II

Mi frue venis al nobel', —
Li rajdis for, vizite.
Mi venis kun vespera stel', —
Li kuŝis jam enlito.

Aŭ en lito li kvietas,
Aŭ estas trans distanco...
Ve, se hom' komplezon petas
Kaj mankas la bonŝanco!

el hebrea trad.
J. Kohen-Cedek (Jerusalem)

BLANKA MARMORO KAJ RUĜA VINO

de Bernard Golden

Estis agrabla surprizo por d-ro Harvey Winston, kiam li trafis prof. Willi Kühn en sia hotelo en Romo. Ambaŭ kleruloj okupiĝis pri la romia arkeologio kaj epigrafo kaj speciale pri la prosopografio⁽¹⁾ de la imperia periodo. Kvankam ili ankoraŭ ne renkontiĝis persone, ili antaŭ longe konatiĝis unu kun la alia sur la paĝoj de fakrevuoj, kie ili ofte debatis, eĉ polemikis. Nun ili ĝojis havi okazon pritrakti kelkajn temojn, kiujn ili ankoraŭ ne kuragiĝis aperigi kiel studaĵojn en presita formo.

Evidentiĝis, ke la du arkeologoj troviĝis en Romo pro tute malsimilaj kialoj. La germana profesoro el la Universitato de Heidelberg, akompanata de sia edzino, venis pasigi siajn feriojn en Italio, dum la usonano, kuratoro ĉe la Universitata Muzeo en Filadelfio, faris studvojaĝon. Ĝis tiam Kühn diskrete iris ripozi en sia ĉambro, por ke la du viroj havu eblon prifake diskutadi.

Kühn invitis Winston al proksima pasteĉ-restoracio por gustumi la plej bonajn picaojn⁽²⁾ en Romo. Dumvoje, la usonano klarigis, ke li alvenis Italion por provi spuri restaĵojn de monumento havanta gravan surskribon. Li rakontis, ke okaze de militservo en la usona armeo dum la dua mondmilito, lia regimento trairis Napolon, kaj li ekvidis sur muro de detruita loĝdomo fragmenton de marmora plato kun longa latinlingva teksto.

«Pro la rapido de la armeaj manovroj, mi ne havis tempon fari lateksan matricon, nek fotografi nek transskribi la epigrafon. Vi povas imagi mian frustron.»

Winston daŭrigis sian rakonton en trankvila angulo de la malgranda restoracio, dum li kaj Kühn trinketis bieron kaj senpacience atendis la grandan anĉovan picaon, kiun la profesoro mendis.

«Bonŝance mi ankoraŭ memoras la enhavon de la teksto kaj la nomojn de la du konsuloj registritajn sur la ŝtono, do mi tuj rekonos ĝin se...»

«Sed kial ĝuste tiu epigrafo alogas vin?» demandis prof. Kühn interrompante sian kolegon. «Ĉu la surskribo estas tiel grava, ke ĝi meritas vojaĝon de fora Filadelfio?»

«Antaŭ tri monatoj ne, sed nun jes», enigme respondis Winston, kiu komencis distranci la pasteĉon, kiun la kelnero ĵus surtabligis. Kühn replenigis la bierglasojn kaj atendis la klarigon.

«Ĉe la komenco de la jaro, unu el la plej malavaraĵoj donacantinoj al nia muzeo alportis kelkajn surskribitajn fragmentojn el marmoro. Ŝi rakontis, ke ŝia avo kolektis ilin fine de la pasinta jarcento, kiam li vagadis en Eŭropo post siaj universitataj studoj. Bedaŭrinde, neniu en la familio scias pri la preciza loko, kie li akiris tiujn pecojn.»

«Denove temas pri antikvaĵo kun obskura historio», komentis Kühn, mordante sian duan pecon de la bongusta picao.

«Jes kaj ne», respondis Winston. «Mi tuj konstatis, ke eblas kunigi kelkajn el la marmorpecoj — ni havas plurajn kompletajn tekst-vortojn — kaj mi sukcesis legi parton de la nomoj de du konsuloj, kiuj oficis unu jaron post la konsuloj menciitaj sur la slabo en Napolo.»

«Kaj kiuj estas ili?» scivoleme demandis la germana klerulo.

«Laŭ mia konjekto, Q. Ninnius Hasta kaj P. Manilius Vopiscus.»

«Ho, do tiu epigrafo temas pri eventoj dum la jaroj 113-114, kiam Trajano estis la imperiestro.»

«Profesoro, vi mirigas min per via profunda erudicio. Vi ricevas eminentan noton por tiu respondo, kaj ankaŭ pli da biero», diris Winston ridetante, kaj li mendis du plujajn botelojn per mansigno direktita al la apudstaranta kelnero.

«Nu, jen la plej grava punkto», ekscitite diris la usonano kun bulo da picao ankoraŭ en la buŝo. «Mi sukcesis decifri la nomon kaj unu el la titoloj de L. Sextius Crispinus, kiu estis, cetere, la dediĉinto de la monumento en Napolo!»

Prof. Kühn, faliginte sian forkon kaj tranĉilon, kun malfermita buŝo gapis al sia kunulo. «Do ĉu vi havas esperon informiĝi pri tiu mistera Sextius Crispinus?»

Winston komprenis la emociigon de sia kolego, ĉar unu el la diskut-temoj, kiuj ege interesis ambaŭ doktulojn estis la identeco de tiu romiano. Konata nur laŭnomo, li sendube ludis gravan rolon en la romia ŝtato, sed ĉar li ĉiam agis malantaŭ la kulisoj, donitaĵoj pri li en la samtempa literaturo malabundas.

«Gratulon, Winston, vi meritas tutan picaon pro via bonŝanca malkovro», diris Kühn, vokante la kelneron, por ke li portu ĉi-foje fromaĝan pasteĉon.

«Bedaŭrinde, ne ĉiuj pecoj el la marmorplato en nia kolekto estas senbreĉe junteblaj. Krome, ili estas tre eroditaj. Tamen, mi sukcesis legi «PRO-». La lasta litero estas difekta, sed ĝi povas esti «C»...»

«Do nia amiko Sextius Crispinus estis *proconsul* aŭ *procurator*, ĉu ne?»

«Plej verŝajne ĉi lasta», diris Winston kun tono de certeco, «ĉar li neniam estis konsulo. Li sendube okupiĝis pri financaj aferoj, eble mastrumis la fiskon de Trajano. Laŭ mia memoro la surskribo, kiun mi vidis en Napolo, apartenas al la kategorio de monumentoj nomataj *cepotaphia*, kiujn kutimis starigi riĉuloj, do la ofico de prokuratoro konvenas al L. Sextius Crispinus. Nu, se mi povos rekonstrui la tutan tekston, mi pruvos, ke viaĵ asertoj pri li en la antaŭlasta numero de *Acta*

Epigraphica estas tute eraraj, ĉar li havis alian karieron dum la regado de Trajano». Winston jam tre vigliĝis pro la temo kaj la trinkado, kaj lia entuziasmo iom pikis la germanan profesoron.

«Nu, mi atendas la rezultojn de viaj esploroj», Kühn respondis, ne tute sincere, ĉar li iom ĵaluziĝis pro la bonŝancaĵo de sia akademia rivalo. «Sed Winston, ĉu vi estas tute certa, ke la fragmentoj en via muzeo kaj la slabo en Napolo apartenas al la sama monumento? Kiam vi intencas iri al Napolo por kontroli tion?»

La mieno de la usona kuratoro subite graviĝis. Li trinketis silente dum unu momento, poste respondis. «Mi estis tie hieraŭ. Mi ne sukcesis trovi la domon, kiu detruigis ĝis la grundnivelo. Oni forportis la rubon tuj post la milito, kaj nun neniu en la rekonstruita kvartalo povas informi min pri la malnovaj konstruaĵoj.»

«Hm-m», murmuretis Kühn, pensigante kaj kapjesante por montri, ke li komprenis la senluziigon de sia kolego.

«Mi konsultis ĉiujn publikigaĵojn pri la epigrafio de Napolo, kaj estas evidente, ke tiu surskribo neniam estis registrita. La klarigo devas esti, ke ĝi ne troviĝis en sia origina starigloko, sed estis tutsimple metita en la muron kiel reuzita konstruaĵ-materialo kaj kovrita per tavolo da stuko. Pro tio ĝi neniam estis videbla dum la domo estis loĝata. Iu bombo malfiksis la stukan tavolon kaj la slabo fariĝis videbla!»

«Via rezonado estas perfekta.» Kvankam komplimentante lin, Kühn samtempe sentis internan kontenton, ĉar Winston nun alfrontis malfacilaĵojn.

«Kühn, vi okupiĝas pri la sama periodo de la historio de Romio. Ĉu vi ne hazarde scias ion pri tiu monumento? Ĝi sendube estis en ĝardeno ĉirkaŭita de muro.»

«Ne, bedaŭrinde ne. Ĝi estas novaĵo por mi, kaj same kiel vi, mi dezirus havi pli da informoj pri ĝi.»

«Kiun konsilon vi povas doni al mi?» demandis Winston iom senespere.

«Kial vi ne provas informiĝi pri ĝi ĉe antikvaj-vendistoj?»

«Kiuĵ?» ekkriis la usonano grimacante. «Tiuj banditoj, kiuj ŝtelas antikvaĵojn antaŭ niaj nazoj kaj vendas ilin al...»

«Trankviliĝu, mia kara Winston.» Mangestante, Kühn interrompis la furiozigitan arkeologon. «Ne estu tro inkлина kondamni ilin. Ankaŭ mi scias, kion ili faras, sed ne forgesu tion ĉi. Dum la milito multe da antikvaĵoj pereis, sed multaj estis ankaŭ savitaj, ĉefe fare de tiuj antikvajistoj, kiuj scipovis aprezi ilian valoron.»

«Ili ŝtelis ilin!» insiste ripetis la usonano.

«Bonvolu ne ekscitiĝi, Winston. Ĉu ŝteli, ĉu kaŝi — ĉiuokaze ili savis multajn objektojn, portante ilin for de la manoj de la veraj vandaloj kaj ŝtelistoj.»

«Ha», ridis Winston. «Mi konas tiun argumenton. La britoj tiel travigis la forporton — nomu ĝin sekvestron, se vi volas — de la Elgin-marmorskulptaĵoj el la

Partenono.» Kaj la kuratoro aldonis per firma voĉo, «Mi tute ne deziras negoci kun tiuj fiuloj.»

«Ne nomu ilin tiel, kara amiko, ĉirkaŭ Kühn, provante paciĝi sian kolegon, por ke li pli volonte akceptu konsilon. «Provu ilin nur unu fojon. Eble ili povos helpi vin trovi la napolan ŝtonon.»

Kvankam iom kontraŭvole, Winston nun pli atente aŭskultis la vortojn de la germana profesoro.

«Morgaŭ mi prezentos vin al la familio Ianuzzi. La patro Filippo dum pluraj jaroj estis la dojeno de la roma antikvajvendistaro...»

Je la mencio de la nomo Ianuzzi, Winston purpuriĝis pro kolero kaj lia kaphararo hirtiĝis. «'Paĉjo' Ianuzzi! Jes, mi jam aŭdis pri tiu fifama antikvajisto. Oni klacis, ke li finance subtenis pli da kaŝprifosadoj en Italio ol tiuj, kiujn oficiale entreprenis la registaraj arkeologoj. Kaj mi aŭdis ankaŭ alian onidiron, ke li vendis laŭ mendo objektojn jam deponitajn en muzeoj.»

«Ankaŭ tiujn ekspoziciitajn en vitrinaj», aldonis Kühn, malice rikanante por ŝoki eĉ pli la kuratoron. Ignorante la protestojn, kiujn Winston estis faronta, la profesoro daŭrigis sian klarigon. «'Paĉjo' Ianuzzi jam de longe 'emeritiĝis', kaj nun liaj gefiloj administras la familian negon. Luigi, kiun mi bone konas, transprenis la filion tie ĉi en Romo. Mi povas certigi vin, ke ili estas tre helpemaj homoj, ĉefe kiam temas pri eksterlandoj. Mi aŭdis ankaŭ, ke ili glite kaj glate aranĝas la 'eksperton' de antikvaĵoj.»

Winston, jam tute senaplabigita, ekstaris. «Sed tio estas kontraŭ la leĝo...»

«La leĝoj estas farataj por esti atencataj», cinike komentis la profesoro.

Fine la kuratoro konfesis al si, ke la sinteno de Kühn, kvankam ne tro etika, ja estas realisma, kaj li konsentis rendevui kun la familio Ianuzzi la sekvan tagon.

—oOo—

La butikoj de la geantikvajistoj Luigi kaj Angela Ianuzzi apenaŭ meritis tiun nomon. Ĝi troviĝis en mucida kelo ĉe la fino de morne malluma flankstrato en la kvartalo Trastevere nur kelkajn paŝojn de Tiberio. Neniu ŝildo aŭ tabulo reklamis la riĉajn varojn stokitajn sub la rubaĵkovrita trotuaro.

La kelo servis ne nur kiel deponejo; ĝi estis ankaŭ la loĝejo de ges-roj Ianuzzi, kiuj tre afable bonvenigis la usonan arkeologon. Tiu ĉi estis elokvente prezentita al ili fare de ilia malnova konato prof. Kühn. Post esprimo de bedaŭro, ĉar d-ro Winston hodiaŭ ne povis havi la plezuron renkontiĝi kun 'Paĉjo' Ianuzzi, kiu ĝuste nun faris kelkajn etajn komisionojn en la provinco, la ŝvelventra Luigi mielvoĉe demandis: «Bonvolu diri al ni, kiel ni povas helpi vin». Dum li balais en sian fortmuskolan manon kelkdekojn da arĝentaj romiaj moneroj kuŝantaj sur apuda tablo, kvazaŭ ili estus paneroj, s-ino Ianuzzi, magra virineto kun akcipitra fizionomio

kaj osteca korpo, alportis karafon da ruĝa vino.

«Tio ĉi estas parto de la tradicia gastamo de la familio Ianuzzi» diris Kühn, turnante sin al Winston.

La usonano ne sufiĉe rapide adaptiĝis al la varmiga etaĵo en la malseka kelo, kaj li daŭre sentis, ke li estas en subtera kuŝejo de du predaŭdaj rabobestoj.

La viroj sidigis cirkaŭ la kaduka tablo, nun kovrita per trivita tuko makulita de kiu-scias-kiom da tavoloj de tomatsaŭco. S-ino Ianuzzi surtabligis glasojn kaj enverŝis la vinon ĝisrande.

Per malmultaj vortoj Kühn skizis la celon de la vizito. Winston prenis el sia teko kelkajn pligrandigitajn fotografaĵojn por montri la detalojn de la ŝtonfragmentoj en sia muzeo. La literoj de la surskribo estis klare videblaj. Dum ĉiuj ekzamenis la fotojn, li rakontis la historion de la mankanta parto de la epigrafo, kiun li vidis antaŭ longe en Napolo.

«Jes», diris Luigi, ŝtelsendante okulumon al sia edzino, kiu staris malantaŭ Winston kaj fikse rigardis la fotografaĵojn de super lia ŝultro. «Ni konas tiun ŝtonon en Napolo. Ĉu vi ne memoras, Angela? Multaj el la tieaj antikvaĵistoj proponis aĉeti ĝin de la domposedanto. Eĉ 'Paĉjo' longe marĉandis kun li, sed la obstinulo rifuzis vendi ĝin. Poste, venis la milito, kaj ĉiuj loĝantoj en tiu domo pereis. Bedaŭrinde.» Sekvis paŭzo en la konversacio, ne por pie rememori la mortintan domanaron, sed por fintrinki la vinon, ĉar s-ino Ianuzzi volis replenigi la glasojn.

«Povas esti», daŭrigis Luigi, viŝante sian buŝon per ĉifita ruĝa poŝtuko, «ke unu el la napolaj antikvaĵistoj sukcesis akiri la slabon antaŭ ol oni malkonstruis la ruinigitan domon. Mi provos informiĝi pri tio, kiam mi denove estos en Napolo. Kiu tago estas hodiaŭ?» li demandis, ĵetante rigardon al la muro, kie pendis kalendaro. «Vendredo. Bone! Morgaŭ mi faros mian kutiman semajnfinan vojaĝon tien.»

Winston proponis akompani Luigi, sed tiu ĉi malpersvadis lin, rezonante, ke estas senutile por li iri tien duan fojon, ĝis estos certaj indikoj, ke la marmora ŝtonplato estas retrovebla. La usona kuratoro konsentis. «Bonege, mi estos tre danka, se vi povos ekscii ion pri la kieo de la slabo.» Lia vizaĝo entuziasme radiis pro antcipado de ebla malkovro de la mankanta parto de la epigrafo. Denove malferminte sian teknon, li elprenis plaston sakon, en kiu estis deko da malgrandaj vatbuloj. Li metis ilin sur la tablon kaj zorge disvolvis la vaton. «Mi alportis kelkajn specimenojn de la marmorfragmentoj en nia muzeo. Mi esperas trovi la ligojn de tiuj ĉi pecoj, kiuj ankoraŭ maljutiĝas ĉe la randoj de la grandaj pecoj ĉe ni. Ĉiuokaze, vi povas utiligi ilin por certigi, ke la marmor-speco kaj la ĉizad-stilo de la literoj de tiuj ĉi kaj tiuj de la napola fragmento estas identaj. Ĉiuj niaj fragmentoj havas flavecan patinon. Ni devas gardi nin kontraŭ falsajtoj. Vi komprenas tion, ĉu ne?»

«Ho jes!» duete respondis gesinjoroj Ianuzzi. Winston enmanigis la marmorpecojn al Luigi, kiu supraĵe rigardinte ilin, vokis transŝulte al iu en apuda ĉambro. «Pasquale! Venu, Pasquale!»

Elvenis el la malantaŭa ĉambro malalta kalva viro, kies ne razita vizaĝo estis kovrita de stopleca barbo. Li portis diklensajn okulvitrojn nigrekadritajn, dismaŝigitan puloveron, multloke flikitan drelikipantalono kaj malpurajn gimnastikajn ŝuojn. «Kia strangulo!» diris Winston al si.

«Pasquale Buongiorno, unu el niaj kunlaborantoj.» Tiel Luigi prezentis la malimponan vireton al siaj gastoj. «Pasquale, ĉu vi rekonas tiun ĉi epigraŝon», demandis Luigi, fingromontrante al la ŝtonoj kaj la fotografaĵoj kuŝantaj sur la tablo. La atento de la malgranda kalvulo estis altirita unue al la preskaŭ malplena vinkarafo kaj, ne atendante inviton, li pleniĝis glason kaj unuglute tralavis sian gorĝon per la ruĝa likvaĵo. Poste, paŝinte pli proksimen al la polvokovrita fenestreto, li strabe ĵetis rigardon sur la bildojn kaj fingrumis la marmorpecojn.

«Eble vi povas vidi pli bone per lupeo», sugestis s-ino Ianuzzi, prenante grandigan vitron el la tirkesto de la tablo. Pasquale malrapide pasigis la lupeon tien kaj reen sur la fotoj kaj la ŝtonoj kaj fine, demetinte la objektojn sur la tablon kaj ŝovetinte siajn okulvitrojn pli supren sur la nazo, li anoncis kvazaŭ ekspertizisto: «Jes, mi konas tiun ĉi specon de grizvejna marmoro. Ĝi abundas en la ĉirkaŭaĵo de Napolo. Ĝi estas ege bonkvalita kaj facile prilaborebla.

«La sinjoro arkeologo el Usono serĉas mankantan fragmenton de la monumento», klarigis s-ino Ianuzzi. Pasquale kompreneme rigardis ŝin de super la rando de siaj okulvitroj.

«Morgaŭ vi iros kun mi al Napolo kaj ni serĉos ĝin. Ĉu bone?» Luigi faris mansignon por akompani sian inviton kaj Pasquale ridetante kapjesis. S-ino Ianuzzi anstataŭigis la malplanan karafon per plena ujo, kaj ĉiuj trinkis, ĉercis, ridis kaj plutrinkis...

—oOo—

Post tri tagoj Luigi telefonis al Winston en lia hotelo kaj informis lin, ke li jam sukcesis akiri la mankantan fragmenton de la epigrafo. La arkeologo ĝojigis pro la bona novaĵo kaj rapidis al la antikvaĵvendejo. Ĉi-foje li sentis sin pli ĉeĥeje en la malgranda kelo, kvankam li tuj rimarkis, ke ne estas loko sur la tablo por la kutimaj vinglasoj. Kuŝis sur ĝi dika objekto volvita en pluraj tavoloj da gazetpapero. Luigi flankenmetis sur seĝon la plenplenan teleron da spageto, kiun li estis manĝonta, kaj disvolvis la pakumon. Antaŭ la larĝe malfermitaj okuloj de Winston aperis fragmento el marmora plato kun kvar aŭ kvin linioj de ĉizitaj latinaj vortoj. Luigi redonis al la kuratoro la fotojn kaj la ŝtonspecimenojn kaj petis lin kontroli la ĵus trovitan slabon.

Tre nervoza, Winston apenaŭ sciis, kie komenci. Per la lupeo li detale komparis la teksturon de la marmoro kaj ties patinon, zorge provis la juntojn inter la malnovaj pecoj kaj la nova fragmento, ekzamenis unuope la literformojn kaj ankaŭ la fajnajn gvidliniojn gratitajn sur la marmorsurfaco, kaj finfine legis la tutan surskribon. Li ekscitiĝis pri la preskaŭ perfekta juntado kaj la facila legebleco de la unuforme ĉizitaj literoj. Li konstatis ankaŭ, ke la legado de la malnova teksto kun la nova estas senchava: la lingvostilo estas la sama, denove estas menciitaj la nomo de la nekonata romia funkciulo kaj ankaŭ la titolita nomo de imperiestro Trajano. Tamen, la faltiĝanta frunto de la arkeologo montris, ke li ne estis tute kontenta.

«Ĉu io ne estas en ordo?» demandis Luigi, kiu kapablis interpreti vizaĝesprimojn same lerte kiel la klerulo tradukis epigrafiajn tekstojn.

«Laŭ mia memoro, la surskribo de la plato sur la konstruaĵo en Napolo estis multe pli longa. Tiu ĉi peco havas nur kvar liniojn krom kelkaj mallongigoj. Kie estas la restanta parto? Rigardu. Tiu ĉi diagonala romprando estas tre akra, apenaŭ erodita. Sajnas, ke la fragmento estis dispecigita antaŭ ne longe.»

Nun estis la vico de Luigi fariĝi nervoza. Obstruktante sian gorĝon, li gravmiene klarigis, ke tiaj valoraj epigraf-ŝtonoj ofte pasas tra pluraj manoj, kaj verŝajne partoj rompiĝis kaj perdiĝis ekde la tempo, kiam iu savis ĝin el la rubo de la detruita domo. Krome, estas kelkaj senetikaj antikvaĵistoj, kiun intence diserigas antikvaĵojn por popeco vendi ilin, tiel ricevante pli grandan profiton. Kaj por forigi unu fojon por ĉiam la suspektemon de la aĉetonto, la juna Ianuzzi aldonis plian informon.

«Ĉu vi povas imagi, kie ni trovis ĝin, mi kaj Pasquale? Estis lia sugesto, ke ni serĉu tie. En la pulbazaroj! Iu senkultura vestaj-brokantisto uzis ĝin kiel sojloŝtonon en sia vendejo. Kia fripono!» kolere kriis Luigi, pugnigante sian manon por fari minacan geston.

La muzea kuratoro ankoraŭ dubeme hezitis pritrakti la negocan flankon de la afero, kaj Luigi fariĝis iom malpacienca. «Nu, se vi ne deziras aĉeti ĝin, se por vi ĝi ne havas valoron, estas egale al mi. Mi estas certa, ke mi trovos alian klienton.» Dirinte tion, li komencis envolvi la slabon per la gazetpapero.

Winston, prenante Luigi ĉe la brako, malhelpis lin daŭrigi la enpakadon. «Bonvolu permesi al mi refoje legi la surskribon.» Sentante, ke li denove regas la situacion, Luigi forprenis la paperojn kaj malantaŭenpaŝis.

Winston ĉi-foje mirfrapite rimarkis alian mallongigon, kiun li preteratentis la unuan fojon pro tro rapida legando: «TRIB. M.» *Tribunus militum* — jen nova donitaĵo», li ekkriis. «Nun mi povas aldoni ankaŭ la postenon de armea oficiro al la plurfaceta kariero de L. Sextius Crispinus. Mi havos tre bonan referaĵon por la venontjara arkeologia kongreso.»

La nova malkovro kaj la minaco de tuja vendebleco de la slabo instigis Winston al rapida decido. Li demandis pri la prezo kaj la 'ekspost-araĝoj' kaj dum li skribis ĉekon, Luigi vokis al sia edzino: «Angela! Bonvolu porti la vinon.»

—oOo—

Sirmataj de la brilaj varmaj radioj de la posttagmeza suno, prof. Kühn kaj lia edzino sidis ekstere sub la tolmarkizo de restoracio en Piazza Navona, trinkante kafon kaj rigardante la petolajn infanojn ludantajn en la Fontano de la Kvar Riveroj. De tempo al tempo la germana profesoro rigardis taggazeton, kiun nazmalkola kolportisto ĵus trudendis al li.

«Ĉu via amerika kolego jam forlasis Romon?» demandis s-ino Kühn.

«Jes. Li ekveturis aviadile frumatene.» Rigardante sian horloĝon, Kühn aldonis: «Li baldaŭ estos hejme kaj povos fanfaroni pri la granda sukceso de sia studvojaĝo. Li ja estis tre bonŝanca». Dirinte la lastan frazon kun subtono de envio, Kühn denove trafolumis sian gazeton.

«Ho, Ilse, ĉu vi scias, ke Pasquale Buongiorno mortis hieraŭ?»

«Ne», respondis lia edzino. «Kiu estis tiu Pasquale Gionbuorno?»

«Buongiorno», ripetis la profesoro, ĝustigante sian eraron. Elpoŝiginte siajn okulvitrojn, Kühn laŭtleĝis al sia edzino la nekrologon, tradukante la italan tekston.

Subite mortis hieraŭ vespere Pasquale Buongiorno, senlabora skulptisto kaj ŝtonĉizisto. Dum la 1920-aj jaroj li atingis famon per siaj klasik-stilaj statuoj, kiuj ornamis plurajn publikajn kaj privatajn konstruaĵojn en nia urbo.

Trovinte sin senokupa dum la periodo de la granda ekonomia krizo, li lasis sin influu de malhonestaj antikvaĵvendistoj kaj falsis antikvaĵojn por la enkaj eksterlanda merkato. Post la dua mondmilito li estis kondamnita al kvinjara malliberigo pro ŝtelo de arkeologiaj objektoj el la *Museo Nazionale*, kie li estis dungita kiel gardisto. Plenuminte la punon, li poste ne povis ricevi komisionojn por skulptaĵoj kaj devis dediĉi sin al la ĉizado de tomoŝtonoj por perlabori vivrimedojn.

La trovo de fragmentoj de antikva marmoro kaj libroj pri la romia epigrafio en la subtegmenteja loĝĉambro de la ĵus mortinta skulptisto igas la policon suspekti, ke Pasquale Buongiorno denove komencis sekvi la nerektan vojon de la falsado de antikvaĵoj kaj epigrafoj.

La Arkeologia Intendantejo de Romo avertas ĉiujn muzeojn, ke ili estu singardaj kontraŭ ankoraŭ ne registritaj epigrafoj sur blanka grizvejna marmoro kun flavbruna patino.

Glosoj

(1) *picao* /itale: pizza/ — granda rondforma itala pasteĉo sen supra tegaĵo, farita el panpasta, ŝmirita per spicita miksaĵo /tomatoj, fromaĝo, hakita vinarto aŭ fiŝetoj/ kaj bakita.

(2) *prosopografio* — speciala studo de la antikva historio celanta identigi ĉiujn historiajn kaj literaturajn personojn laŭ periodoj kaj regionoj surbaze de skribaj dokumentoj, moneroj, epigrafoj, ktp.

AL LA GEKANTISTOJ EL TERRASSA (1)

Kiel vi vekigiĝis, amikoj el Terrassa! kian gajan krion vi elĵetis al la naskiĝanta suno! Vi, la laboristoj: dormadis en via laboro, kaj laborante, vi sonĝadis. Kaj via sonĝo estis jena. Estas forte dolĉe gajni al si la panon kaj ĝin porti hejmen; estas dolĉe vidi la gefilojn manĝantaj, kaj la maljunulojn tute vestŝirmitajn ripozadantaj ne mankaj je io; kaj la edzinon belvestitan mastrumadanta en la abundeco de la hejmo...; sed, ĉu ne ekzistas io alia ankoraŭ?... Estas ebriiga la fiereco pri l' laboro, kiam oni sin sentas mastro de la aferoj, kaj kiam oni ilin transformas ilin riĉigante kaj sin riĉigante per ili; estas plezuro fariĝi riĉa... sed, ĉu ne ekzistas io alia?... ĉu ne ekzistas io alia ankoraŭ?... Estas profunda ĝojo laborakiri por si la necesajon kaj la superfluan, kaj batali kaj venki, kaj kontentiĝinte, povi al si ornami la venkajn manojn per la brila superfluo de la orringoj, simboloj de la venkoj, kaj povi etendi la manojn tiel juvelornamitajn, kun rega gesto, en domo granda, kaj bela, kaj nia, sur la personojn, kiuj en ĝi loĝas kaj sur tiujn, kiuj eniras kaj eliras, kaj grandigadi ĉirkaŭ ni nian imperion... sed, ĉu ne ekzistas io alia ankoraŭ?... Ĉu ne ekzistas io pli bona ol la regadoj kaj la imperioj, pli bona ol domo granda kaj propra, pli bona ol ringoj ĉe la fingroj kaj diademoj ĉe l' tempioj, pli bona ol la pano? (Dio mia, pli bona ol la pano!) Tiu estis via sonĝo kaj tiu ĉi la maltrankvilo pro via sonĝo. Sed, subite, vi malfermis la okulojn al la radio de la naskiĝanta suno, kiu ilin vundis, kaj ekkreis en unu kanto, vi, malriĉuloj kaj riĉuloj, malgrandaj kaj grandaj, mastrantoj kaj mastratoj, venkantoj kaj venkatoj de l' laboro, kaj vi spertis, ke en tiu ĉi kanto ĉiuj vi egale ĝojas, kaj ke tiu ĉi frateco de la kanto estas pli bona ol la pano kaj ol la oro, kaj ol ĉiuj riĉaĵoj kaj ol ĉiuj regadoj sur la mondo.

Kiam malriĉulo kantas, li ridas je la riĉuloj kaj je iliaj riĉaĵoj; kaj kiam riĉulo kantas, li sentas sian ĝojon frata al tiu de la malriĉulo, kaj eĉ li donus al li la sangon. Ĉar, efektive, kiam oni kantas, oni sentas sin liberigita de ĉia bezono, de ĉia timo kaj de ĉia ambicio; ĉar tiam parolas en ni tiu senmorta parto de nia estaĵo, kiu ne povas suferi malsaton nek malvarmon, kiu ne povas esti ĉikanata nek premata de iu nek pro io en la mondo, nek ankaŭ ĝi havas bezonon de regado por fariĝi kontenta. Kiam patrino kantas al sia filo, eĉ se tio okazas en mizera angulo, en tiun angulon eniras konsolo, kiu kontraŭstaras ĉiaspecan maltrankvilon. Se reĝo kantadus en sia palaco, vi vidus la kronon fali de lia kapo, kaj lin, malsupreniradi kvazaŭ ensorĉita, ŝtupon post ŝtupo, de sia altaĵo, ĝis li ame kunmiksiĝus kun la popolamaso, forgesante ĉiun alian reĝecon. La martiroj pro la grandaj faktoj, tamen, ĉu malriĉaj kaj malsaĝaj ili estas, ili ŝajnas reĝoj, kiam kantante ili iras morti, kaj mortas sensente. Ĉar, efektive, ekzistas interne de ni io pli forta ol la egoismo kaj la morto, kaj ĝi estas la kanto de nia animo. Iafoje ĝi kantas sen voĉo en la aero. Kiam volonte vi donas almozon al almozulo, kaj liaj benoj sekvas vin kiel trenaĵo, vi aŭskultu vin bone; vi sentos kvazaŭ ion strangan kaj plezurigan, vi ne scios kie, sed tre interne, tre interne de vi: ĝi estas la animo, kiu kantas. Kiam la virino, kiun vi iluzie amas, rigardas vin, nur rigardas, sed tre dolĉe, vi ne scias kio okazas en vi, vi nur perceptas certan kaj grandan harmonion en via estaĵo; ĝi estas la kanto de la animo. Kiam ŝtormo de la vivo pasis sur vi lasante vin senkuraĝaj kaj sencelaj, poste fariĝas en vi kvieto kvazaŭ morta; al vi ŝajnas, ke ĉio finiĝis por vi kaj vi rigardas ĉion, kio estas ĉirkaŭe, kun kvazaŭ definitiva torporo; sed jen en horo pli neatendita, tial ke brilas sunradio, kiu ne brilis, aŭ pro rido de infano, aŭ eble vidante pli grandan malfeliĉon, meze de la granda kvieto de via malĝojo, la animo rekomencas sian kanton de vivo, kaj larmoj tre dolĉaj supreniras al viaj okuloj kaj paca rideto, kvazaŭ ĉielarko, al viaj lipoj, kaj vi sentas interne iom da serena eterneco.

Ĉu vi ne kredas, ke tiuj momentoj estas io plej bona en la vivo? Pli bona ol oro, pli bona ol regado, pli bona ol pano? Do, vi diru nun al mi, ĉu via kuniĝo por kantadi kaj aŭdi kantadon ne estas vekigo via al la vera vivo, por renovigi per viaj kunfratiĝintaj voĉoj, tiujn momentojn de liberiĝo kaj saviĝo supre de via laboro, de viaj mizeroj kaj de viaj ambicioj. Vi povas, per viaj manoj, gajni la ĉiutagan panon, vi povas batali inter vi por la riĉeco kaj regado, sed estas same, ĉar ĉiufoje kiam vi kunlernas kantadi unufoje, vi kunlernas vivi en ĉio cetera kiel fratoj; kaj kantante, kantante, vi atingos tiun idealon de humaneco, en kiu ne ekzistas mastrantoj nek mastratoj, nek malriĉuloj, nek riĉuloj, nek malgrandaj nek grandaj, sed en kiu, kantante per unu voĉo, per sia, kia ajn ĝi estas, ĉiu ĝin trovas ame kunligita kun ĉiuj aliaj en la granda himno de la universala animo, kiu estas fonto de la tuta vivo.

Ni kantu, do, kunfratoj, la horo estas bela...

Joan Maragall

Trad. el la kataluna lingvo:
Josep Ventura i Freixes

(1) Parolado de la aŭtoro, antaŭ voĉkoncerto, en la Ĉefa Teatro de Terrassa. Jaro 1904a.

LA PERDITA HONORO DE IU KATARINO BLUM' de Henriko Boelo

Tiu estas rimarkinda libro. Ĝi estas rimarkinda pro sia enhavo, rimarkinda pro sia formo, rimarkinda pro la lingvaĵo de sia verkinto kaj fine rimarkinda pro la personeco de la protagonisto.

La libro prezentas aspektojn de la aktuala (1974) vivo en la Federacia Respubliko Germanio. Ĝi senmaskigas la semskrupulajn kaj eĉ intrigajn agitadojn de certa bulvarda ĵurnalo. Per siaj informoj la veron fuŝintaj tiu ĵurnalo tiagrade ĉagrenas laboreman, kapablan kaj profesie sukcesintan virinon, ke tiu ĉi, kiu sentas sin malhonorigita, fine venĝe mortpafas ĵurnaliston. Li fariĝis por ŝi la reprezentanto de la tuta malbono, kiu ŝin trafis. Certe malpravas ĉiuj tiuj, kiuj opinias la kritikon de Henriko Boelo pri certaj malĝojigaj fenomenoj de nia socio laŭ-principa kritiko pri nia socio entute. Kiam li skribis la rakonton pri Katarino Blum', tiam estis ankoraŭ freŝdata la afero de Ulrikino Majnhof'. Jam neniu tiam povis supozi la amplekson de la internacia terorisma movado. Tial ne estas surprizige, ke Henriko Boelo kun fajna ironio reliefigas la iom troigitan singardon de la polico, kiu verdire kvazaŭ milite konkiras la loĝejon de izole vivanta virino. Aliflanke li tamen realece kaj detale priskribas la polican, laŭ-nature ja apenaŭ agrablan demandadon kiel humanan kaj parte eĉ kiel familiece mildan proceduron. Tiuj oficistoj plenumas sian devon, kaj ili faras tion sen nenecesa rigoro kaj ne sen sentebla simpatio por la demandadata persono. Ekstreme singarde la polico ankaŭ kondukas ĉe la arestado de la «kara Ludoviko». Ĉi tiun fojon pli prave! Se ankaŭ tiu ne estas teroristo, li tamen ne estas sendanĝera bubo, kiu ne ektimiĝas preni sian revolveron kaj pafaĉi ĉirkaŭen. Kie Henriko Boelo per sia prezentado akuzas, li faras tion por videbligi difektojn, ke ni ekkonu niajn mankojn kaj sociajn malsanojn. Ja tia malsano ankaŭ estas la histerio pri ĉio, kio ankaŭ nur iomete de malproksime aspektas kiel politika maldakstraĵo. Tiun fobion Henriko Boelo superŝutas per malkaŝa mokado. Akuzindaj unuavice estas la senskrupululoj kiuj miŝuzas la liberon, pri kiuj ili disponas. Akuzindaj ankaŭ estas tiuj, kiuj apartenas al la avida, snoba kaj manĝegema elegantularo, kiu renkontiĝas en certaj rondoj, pri kiuj Elzin' Voltershejmo amare plendas.

Aparte rimarkinda estas la formo de la rakonto. Tra la tuta libro la rakonton akompanas speco de verkada teorio. La rakonto kaj ties fontoj estas komparataj al sistemo de flakoj de diversaj niveloj. La «flakludanto», t.e. la verkisto, interligas la flakojn. Ilia «potencialo» ekmoviĝas. Ilia akva enhavo ekfluas, unuiĝas, kelkfoje ankaŭ estas haltigata, tiel ke estiĝas retenadoj, ĝis ĝi denove estas ekflui-

gata kaj fine malaperas en la granda defluilejo de la nesciata estonteco. Oni ankaŭ povus paroli pri inversigita kriminala romano. Tuj je la komenco, jam en la tria ĉapitro, la faktoj estas sciigataj. Temas pri murdo kaj, neniam dubo pri tio, la murdistino estas Katarino Blum', kiu prezentas sin mem al la polico. Finita do la afero! Sed ne, nun komenciĝas la interesege, la ekscitiga malantaŭen direktita klarigo de la eksteraj kaj internaj cirkonstancoj, kiuj kaŭzis tiun murdon. Temas ĝuste pri la klarigo «kiel potenco», nome perfortiga potenco, «povas estiĝi kaj kien ĝi povas konduki». Tiu procedo nur finiĝas post la kvardek-naŭa de la kvindek-ok ĉapitroj. Ĉio ĝis tie rakontiĝas rilatas al la okazaĵoj de nur kvar tagoj, nome ekzakte al tiuj de la 20-a ĝis la 24-a de Februaro en 1974. La resto koncernas pliajn okazaĵojn, perspektivojn kaj ŝancojn. Ĝi kulminas en la lasta konfidencia raporto, kiun Katarino Blum' skribe fiksis je dispono de sia advokato por la proceso.

La lingvaĵo de Henriko Boelo en ĉi tiu libro estas apenaŭ literatura laŭ la tradicia senco de la vorto. Ĝi estas multloke eĉ banala, ĉiam realeca, konkreta kiel protokolo, celanta kaj insistanta pri faktoj, datoj kaj horoj. Multo okazas. Multaj personoj aperas. Ili ĉiam estas karakterizitaj ŝpareme kaj nur tiom, kiom la rakonto nepre bezonas, ne pli. Meditaj tekstpartoj estas, krom la jam cititaj verkadaj rimarkoj, tre maloftaj. Al ili apartenas ekzemple la duonironie psikologiaj pripensadoj rilate al la animstato de oficiala telefonsubaŭskultanto. Ironiaj estas ankaŭ oftaj mallongaj, kiel fotofulmo la situacion aŭ personon klarigantaj, kvazaŭ parenteze diritaj, komentaj rimarkoj. Sed troviĝas ankaŭ mirige detalecaj, tamen pro ilia realeco tute ne tedigaj tekstpartoj, ekzemple la longa telefona babiladaĉo inter la kuiristino de sinjorino Lujdingo kaj la sekretariino de ŝia edzo pri ties desertaj deziroj. Gravan rolon ludas la laŭvortaj konversacioj. Ili estas realecaj, drastaj, malfektitaj, tute nature efektantaj. Tiu efekto ankaŭ daŭras, kiam ili fariĝas oblikaj, kio iom ofte okazas. La vortaro de la rakonto estas ĉiutaga, simpla kaj banala, nepre malliteratura. Tiel hodiaŭ oni parolas, tiel oni esprimas sin, tiel oni vortas.

Aparte rimarkinda, se ne fascina, estas Katarino Blum' mem, tiu virino, kiu, eĉ fariĝinte murdistino, apenaŭ perdas nian simpatian. Ŝi devenas el iom duba laborista familio, spertas malfeliĉan edzecon kaj baldaŭan postan separon. Ŝi sukcesas per celstreba laŭoremo atingi sendepandan ekziston. Meze en la seksobsedita moderna mondo ŝi kondukas virte, ne pro iaj moralaj kialoj, sed tute simple, tute nature, laŭ interna inklino, netuŝita de la fakto, ke oni taksas ŝin prudulino, nomas ŝin monaĥino. Kaj tutkonforme, en la mo-

mento, kiam venas tiu, «kiu jen estis venonta», ŝi same simple, same nature, senhezite kaj laŭ interna impulso, donas sin al li kaj daŭrigas por li sian amon, ankaŭ kiam ŝi eksciĝas, ke li estas krimulo, longe serĉata bandito, ja, eble murdinto. Preskaŭ ĉie, kie ŝi aperas, ŝi akiras la simpatian, la estimon, eĉ la amon de la personoj kun ŝi rilatantaj. Ŝia profesia taŭgeco estas pruvita, ŝia karaktero lojaleco senduba. Kaj tiu simpatio de la aŭtoro por lia kreita romanfiguro, respegulita en la simpatio, kiun la aliaj personoj de la rakonto sentas por ŝi, komuniĝas al la leganto, kiu ne povas ne bedaŭri la fatalon, kiu ŝin trafas.

Kiel Gerardo Hauptmano, kiu ricevis la Nobelpremion pri literaturo en 1912, kiel Tomaso Mano, kiu ricevis ĝin en 1929 kaj kiel Hermano Heso, kiu ricevis ĝin en 1946, Henriko Boelo ricevis ĝin en 1972. Same kiel liaj antaŭuloj dum ilia epoko, Henriko Boelo estas hodiaŭ la plej elstara, por tiel diri la reprezenta Germane skribanta verkisto. Li mem verŝajne energie protestus, se oni rigardus lin iel ajn kiel oficialan institucion de la Federacia Respubliko Germanio. Tio ne malhelpas, ke lia jam tre ampleksa verkaro aperas en multaj miloj da ekzempleroj, ke li estas tradukita en multajn lingvojn, kaj

— atentinda fenomeno en nia haste vivanta epoko — ke liaj libroj estas legataj de vasta, ĉiam pligrandiĝanta publiko. Multaj el liaj legantoj inklinas vidi en li ion kiel «la oficialan konscion de la Federacia Respubliko Germanio». Ankaŭ kontraŭ tiu rolo Henriko Boelo supozeble protestus. Li tamen estas, tute senceremonie, vigle atenta spirito, altgrade libera de antaŭjuĝoj, libera ankaŭ de ia ajn ideologio. Zorgeme li observas aktualajn okazaĵojn kaj analizas ilin kaj tiel akiras la temojn kaj la materiojn por siaj verkoj. La rezulto ne ĉiam estas agrabla por tiuj, kiujn lia kritiko rilatas.

Li naskiĝis en 1917 en Kolonjo ĉe Rejno kiel filo de skulptisto kaj lignajisto. Li frekventis la gimnazion ĝis 1937. Post lia abiturienta ekzameno li unue celis fariĝi librovendisto, sed baldaŭ li rezignis pri tio kaj komencis verki, vivtenante sin per privataj lecionoj. En 1939 li komencis studadon pri la Germana kaj antikvaj lingvoj. Tiun studadon interrompis la milito. Trifoje vundita, li travivis la militon kaj revenis poste al Kolonjo, kie li komencis sian sukcesplenan karieron kiel profesia verkisto.

Rikardo Sulco, D-Minden

K L A R I G O

En numero 3/78 de *Horizonto* sur paĝo 64, aperas «Pripensinda Rakonto», en traduko de D-ro J. L. Tortel, anstataŭ de F. Liebl, kies subskribo aperas erare en la revuo.

« P E R S P E K T I V O »

La voĉo de la dana agadgrupo de la Neŭtrala Esperanto-Movado

Ĉu vi konas tiun novan bultenon? — Juĝu ĝin vi mem!

Redaktorino: Rie Krainer, Skolegade 27, DK-4690 Haslev, Danlando, Telf. (03) 69.22.26, ĝirkonto: 9.32.95.95.

Jarabono por «Perspektivo»: 35 d.kr. jare (10 numeroj)

IVª INTERNACIA KONFERENCO DE NEM

Ĉu vi deziras aŭskulti dum viaj kunvenoj, la prelegojn pri la ĉeftemoj de la IVª Internacia Konferenco de NEM, okazinta en Jaca (Hispanujo)?

La Administracio de «Horizonto» prizorgas kopiojn. Prezo po kaseto: 300 ptoj. Informas: Inés Gastón, P.º Marina Moreno, 35, 4.º dcha. Zaragoza-1 (Hispanujo).

Redaktas Prof. Ivo Lapenna

N-ro 15

21 DISKUTI SEN MISTIFIKOJ

Verŝajne en aŭgusto 1978 s-ro Zdenko Křimsky sendis al la redakcio de *Horizonto* longan malfermitan leteron sen dato, en kiu li skribis en la fino: «Ĉar mi dubas, ke vi publikigos mian leteron komplete, tiun ĉi leteron mi sendas kopie al pluraj redakcioj por publikigo».

Ĉar tiu preskaŭ kvarpaĝa letero de s-ro Křimsky, la sekretario de Ĉeĥa Esperanto-Asocio (aliĝinta al UEA), enhavis ĉefe atakojn kontraŭ la redaktoron de tiu ĉi rubriko, la redakcio de *Horizonto* plusendis ĝin al li. La 6-an de septembro 1978 mi skribis al s-ro Křimsky, ke mi estas preta publikigi lian leteron en la rubriko redaktata de mi, se li limigas la leteron al maksimume unu paĝo. Mi aldonis, ke mi pretas fari tion sub la kondiĉo, ke la saman mallongigitan tekston, al kiu mi aldonos same longan, nome unu-paĝan, komenton, li publikigu, kune kun la komento, samtempe en la ĉeĥa *Starto*. Estis akcentite, ke «nur tiamaniere kaj la legantoj de *Horizonto* kaj tiuj de *Starto* povos ricevi objektivan bildon pri la afero». Mi petis tuj informi pri la konsento.

Pli lojale kaj objekte ne eblas agi, sed, post la spertoj sub la signo de Hamburgo, oni ne povis atendi eĉ la plej elementan reciprokecon. Efektive, s-ro Křimsky tute ne respondis al la menciita letero, sed publikigis sian tutan «malfermitan leteron» sub la titolo «Disputi sen Mistifikoj» en sia *Starto*, n-ro 4/1978. Pretere dirite, ŝajnas ke la nomitaj gvidantoj de la Esperanto-instancoj en la blokaj landoj tute ne scias diskuti, ĉu kun mistifikoj, ĉu sen mistifikoj, sed nur disputi, ĉar ankaŭ la orientgermana *der esperantist* uzas la saman terminon.

Do, tiu «disputo sen mistifikoj» estas plena de mistifikoj kaj rektaj mensogoj kun plia partipolitika propagando por la sovetisma koncepto de paco kaj atakoj kontraŭ ĉiujn, inkluzive la neŭtralan Esperanto-Movadon, kiuj estas por vera paco en libereco.

Ni ne polemikos kun s-ro Křimsky sed donos al la legantoj de *Horizonto* nur unu ekzemplon de mistifikoj, pli precize ordinaraj mensogoj, kiuj svarmas en lia letero. Skribante pri la informo publikigita kiel ero 14 de tiu ĉi rubriko en *Horizonto* n-ro 3/78, s-ro Křimsky skribas:

«Profesoro Lapenna denove citas 'informojn' el orienteŭropaj landoj kiel en 'Hamburgo en Retrospektivo' kaj informas intence antaŭ la UK en Varna (p. 58) pri sekretaj kunvenoj en Poprad, kies celo (!) estas eventuale kreo de Internacia asocio sole de la socialismaj landoj aŭ eĉ 'tute ekregi UEA-n'. Mi supozas, ke Profesoro Lapenna ne estas naivulo, sed ke li nur intence provokas homojn.»

Same kiel en *Hamburgo en Retrospektivo*, tiel same en tiu ĉiu rubriko la prezentitaj faktoj baziĝas sur absolute fidindaj informoj. Eĉ s-ro Křimsky ne havas la kuraĝon nei, ke la sekreta kunveno fakte okazis antaŭ la UK en Varna, same kiel li ne povas nei, ke sekreta kunveno de la orienteŭropaj komplotintoj okazis en Orienta Berlino senpere antaŭ la UK en Hamburgo en 1974. Alia afero estas la analizo de la faktoj. Tiurilate estu cititaj miaj vortoj:

«La supozo, ke dum tiu ĉi lasta sekreta kunveno oni eble planis la fondon de nova asocio 'nur por la popoldemokrataj landoj' aŭ 'tute ekregi UEA-n' povas esti ĝusta, sed tio ne estas verŝajna. Por la partipolitikaj faktoroj ekster UEA kun siaj peonoj en UEA mem pleje konvenas ĝuste la nuna stato: libera partipolitika agado en la kadro de kvazaŭe partipolitike neŭtrala internacia asocio sen timo de kia ajn rezisto, aŭ eĉ nur milda reago, fare de la komitato kaj estraro de tiu asocio, aŭ de la organizaĵoj apartenantaj al ĝi. Eĉ pli aperta ekregado de UEA (aŭ de kiu ajn alia jam ekreginta neregistara internacia organizaĵo) — ekzemple transporto de la sidejo de UEA el Rotterdama en Sofion, Varsovion aŭ alian urbon en la bloko de la Varsovia Pakto — signifus eraron el vidpunkto de la partipolitikaj intereso de la decidaj partipolitikaj faktoroj en la bloko, klare formulitaj en la nuna oficiala partipolitika linio. Tiu linio postulas partipolitikan agadon unuavice en organizaĵoj konservantaj la fasadon de politika neŭtraleco kaj sendependeco, kun sidejoj en demokrataj landoj, tial ankoraŭ kredindaj, aldone al agitado kaj propagando pere de organizaĵoj kun sidejoj en la bloko, rekte financataj kaj aperte dependaj de la ŝtataj-partiaj instancoj, tial komplete kompromititaj ekster la bloko. Tiu linio estas dokumente prezentita en tiu ĉi rubriko de *Horizonto* n-ro 4/77, p-oj 79-80.»

Ciu leganto bv. kompari la kursivilitere presitan tekston de s-ro Křimsky kun la diklitere presita teskto de mi mem por konstati ĝis kiu grado tiu sinjoro mistifikas «en disputo sen mistifikoj».

En la sama informo estis skribite en la fino:

«Plej verŝajne la menciita sekreta kunveno ricevis instrukciojn pritrakti la taktikon aplikotan por partipolitika propagando dum la UK en Varna, ĉefe pere de la t.n. Mondpaca Esperanto-Movado (MEM), kiel ankaŭ la intensigon de la kampanjo kontraŭ la neŭtralan Esperanto-Movadon, ĝian laŭtparolilon *Horizonto* kaj, aparte, la redaktoron de tiu ĉi rubriko per novaj kalumnioj kaj elpensaĵoj. La baldaŭa estonteco montros la ĝustecon aŭ neĝustecon de tiu ĉi antaŭvido.» (P. 58.)

Efektive, la partipolitika agado inter la kongresanoj en Varna, la letero mem de s-ro Křimsky, la skribado de *der esperantist* post la sekreta kunveno kaj aliaj faktoj konfirmas la ĝustecon de la antaŭvido.

Tiu ĉi ero kompletigas ĉap. 5.3 kaj 5.4 de *Hamburgo en Rerospektivo*.

22 PLIAJ PERSEKUTOJ DE ESPERANTISTOJ EN ĈEĤOSLOVAKIO

El Ĉeĥoslovakio atingis nin pluraj informoj pri pliaj persekutoj de esperantistoj. La informoj venis de absolute fidindaj personoj, kies sciigoj estis apogitaj eĉ de filmoj de oficialaj dokumentoj. Temas pri s-roj M. Sváček kaj V. Srna, kontraŭ kiujn komenciĝis kriminaljura persekuto la 16-an de aŭgusto 1978. S-ro M. Sváček apelaciis kontraŭ la decidon pri persekuto kaj akuzo al la regiona prokuroro en Hradec Králové, sed la prokuroro D-ro Alois Bráblík, per sia decido I Kv 58/78 de la 24-a de aŭgusto 1978, forĵetis la apelacion. Sekve, pastro V. Srna, nuntempe degradita al pozicio de hejtisto en pulmkuracejo en Babice nad Svitavou, kaj M. Sváček troviĝas sub akuzo konforme al art. 160/1 kaj 163/1 de la punleĝo. Srna estas akuzita pro la «krimago de malhelpado de kontrolado de la eklezioj kaj religiaj societoj», dum M. Sváček estas akuzita pro «helpado al krimago de malhelpado de kontrolado de la eklezioj kaj religiaj societoj».

En kio konsistas la «krimagoj» de la du esperantistoj? Pri la tuta afero estas verkita ampleksa dokumento kun ĉiuj detaloj pri faktoj kaj analizo de la juraj aspektoj. La dokumento estas sendita al IKUE, Radio Vatikana, KELI, Sekretario de IEAJ, la CO de UEA por la Estraro de tiu Asocio kun la instigo interveni cele al ĉesigo de la persekuto de Sváček kaj Srna. Ankaŭ Amnestio Internacia estas informita pri tiu kontraŭleĝa malrespekto de unu el la gravaj homaj rajtoj kaj fundamentaj liberecoj. Ĉi tie estu prezentitaj nur la plej esencaj faktoj.

De la 9-a ĝis la 23-a de julio 1977 okazis en la vilaĝo Herbortice, Bohemio, ĈSSR, «Libertempa Esperanto-Tendaro» (LET). La estro estis s-ro Miloslav Sváček, kiu jam dum la antaŭaj 9 jaroj organizadis similajn tendarojn. La ĉefa celo estis diversgradaj kursoj de Esperanto, kiuj okazadis ĉiutage en la matenaj kaj antaŭtagmezaj horoj. La libera tempo estis utiligata por sporto, amuzprogramoj kaj rakontado de travivaĵoj dum eksterlandaj vojaĝoj faritaj pere de Esperanto. Partoprenis entute 130 personoj de diversaj aĝoj, inter kiuj ankaŭ kelkaj esperantistoj en Pollando, 3 ĉeĥaj katolikaj pastroj kaj pastro J. Zielonka el Tarnow. En la tendaro regis perfekta ordo bazita je libervola respektado de la tendara regularo.

La 21-an de julio 1977 je la 8-a horo matene la tendaron vizitis civile vestitaj policistoj kaj la administranto de ekleziaj aferoj de la distrikto. Okazis traserĉoj kaj esplorekzamenadoj. La tendumado estis tuj ĉesigita, sed la partoprenintoj estis dum monatoj kaj plu estas eksplorekzamenataj kaj diversmaniere ĉikanataj de la politika polico.

El la 4 pastroj, 2 helpis kiel kursgvidantoj, dum la 2 aliaj estis lernantoj. Pastro J. Zielonka ricevis de la tendarestro la permeson celebri la meson en la loka «hangaro» sub la kondiĉo, ke tio okazu antaŭ la oficiala horo por vekiĝo de la tendaranoj. Tio estas la unua kriminaljura kulpigo kontraŭ M. Sváček.

La dua «krimo» estis la preĝado kaj kantado de kantoj kun religia enhavo, kiel ankaŭ respondoj je demandoj rilate religion kaj vivproblemojn, precipe de la junularo. La tria kulpigo estas la fakto, ke en la proksimeco de la tendaro troviĝis sur arbotrunko alnajlita kruco, farita el betulaj branĉetoj, unu metron longa. Post la foriro de la tendaranoj la kruco, troviĝinta sur la sama loko jam 9 jarojn, estis forigita de nekonataj personoj.

Tio estas la «krimoj», kiujn la ŝtata prokuroro imputas al Sváček kaj Srna. La agoj imputitaj al la akuzitoj laŭ la kriminala leĝo estas fakte permesitaj laŭ la Internacia Pakto pri Civitanaj kaj Politikaj Rajtoj, kiun Ĉeĥoslovakio ratifikis kaj tiu tiel fariĝis la Leĝo 120/76 de tiu lando. Konforme al art. 18 de la Pakto, ĉiu havas la rajton kaj liberecon manifesti, ĉu sola, ĉu kune kun aliaj, ĉu publike, ĉu private, sian religion aŭ kredon per instruado, praktikado, adorado kaj observado. Tial la persekuto de la du esperantistoj estas ne nur kontraŭa al la rekonitaj rajtoj kaj liberecoj laŭ internacia juro, sed ankaŭ laŭ la juro de Ĉeĥoslovakio.

Hontinda ago okazis la 17-an de majo 1978, do antaŭ la oficiala ŝtata akuzo kontraŭ Sváček kaj Srna. Dum tiu tago estis aranĝita en la distrikta oficejo de la politika polico de Usti nad Orlicí t.n. «ekstertribunala juĝado» aŭ «traktado». Ceestis la distrikta prokuroro, distrikta poliestro, ŝtata administranto de ekleziaj aferoj, distrikta prezidanto de la Asocio de Socialisma Junularo, reprezentanto de la laboronanto de M. Sváček, vilaĝestro de Cotkylte-Herbortice, reprezentantoj de Ĉeĥa Esperanto-Asocio — la sekretario Zdenko Křimský kaj la prezidanto de la politika komisiono de ĈEA, Pisk — kelkaj policistoj kaj, fine, la akuzito M. Sváček. Tie oni denove imputis al Sváček la samajn «krimojn», dum la reprezentantoj de la Ĉeĥa Esperanto-Asocio, aliĝinta asocio de UEA, s-roj Křimský kaj Pisk, esprimis la saman fanatike kontraŭreligian maltoleremon, kiel la menciitaj reprezentantoj de la ŝtataj aŭtoritatoj. Siavice, la prezidanto de ĈEA kaj komitatano de UEA, s-ro J. Vítek, aprobis tiun tutan hontindan aferon kaj komunikis en la organo de ĈEA *Starto* (Informace č. 49/78) informon pri la eksigo de Sváček el ĈEA.

Tiamaniere reprezentantoj de landa instanco, kiu formas parton de UEA, eĉ komitatano de UEA, partoprenis, kune kun la ŝtata prokuroro kaj reprezentantoj de la politika polico, en persekutado de esperantistoj, kies sola «krimo» estas plenumo en ege modesta kaj diskreta formo de unu el la fundamentaj homaj rajtoj kaj liberecoj. Ĉu, eble, s-ro Z. Křimský publikigos nun novan «nefermitan leteron», en kiu li neos ankaŭ la suprajn faktojn?

Tiu ĉi ero povas esti aldonita al ĉap. 21.4 de *Esperanto en Perspektivo*.

23 ESPERO KATOLIKA KONFISKATA EN ĈEĤOSLOVAKIO

N-ro 9/78 de *Espero Katolika* informas, ke ekzempleroj de tiu periodaĵo, senditaj per ordinara poŝto kiel presajaĵo al adresoj de ĉeĥoslovakaj esperantistoj, neniam atingis sian celon. La ekzempleroj senditaj registrite estis resenditaj al la redakcio kun la indiko «enhavo kontraŭa al la doganaj preskriboj» (p. 171).

D-ro Antonio De Salvo, la direktoro de *Espero Katolika*, sendis al la ĉeĥoslovaka ambasadorejo en Romo leteron, en kiu li petis klarigon pri la formalajaĵoj, kiujn li devas plenumi por sendi al Ĉeĥoslovakio donacajn publikaĵojn, en tiu ĉi kazo revuon laŭ karaktero ekskluzive kulture-religian, kiu kaŭzas «nenian damaĝon al la sekureco kaj al la publika ordo, al la saneco, al la bonaj moroj aŭ al la fundamentaj rajtoj kaj liberoj de aliaj». Ne estas konate ĉu D-ro De Salvo ricevis ian ajn respondon.

24 SOVETAJ ESPERANTISTOJ RICEVAS INSTRUKCIOJN

Amiko de *Horizonto* en Soveta Unio skribis interalie:

La «21-an de julio oni nin akceptis en Domo de Amikeco por /kun/ Eksterlando. Tie mi aŭskultis kune kun la forveturontoj al Varna Kongreso (105 homoj!) instrukcion, vidis ĉiujn ĉefajn gvidantojn (oficialajn) de Esperanto-aferoj en Soveta Unio. La rilato al Esperanto ĉe ni pliboniĝis kaj laŭ promeso de ĉefuloj dum oktobronovembro estos oficiale fondita ASE /Asocio de Sovetaj Esperantistoj?/ Principe eĉ temis pri la aliĝo de ASE al UEA. Certe ne tuj, sed post unu-du jaroj, ĉar la «reakciuloj» (I. Lapenna kaj aliaj) ne plu gvidas UEA.»

Sen komento. Ni lasas al la legantoj juĝi kiu kaj kiuj estas la veraj reakciuloj en la nuntempa Esperanto-Movado: ĉu tiuj, kiuj vivtenas la tradician partipolitike neŭtralan esperantismon kaj plu agas konforme al la Statuto de UEA eĉ ekster UEA, aŭ tiuj, kiuj agas partipolitike, helpas la subpremadon de la fundamentaj homaj rajtoj kaj liberecoj? En ĉiu okazo, la fakto, ke esperantistoj el la blokaj landoj ricevas instrukciojn, estas ankoraŭfoje konfirmita.

25 KORESPONDA SERVO MONDSKALA

Sur p. 76 de *Esperanto en Perspektivo* estas dirite, ke la Koresponda Servo Mondskala estis fondita de UEA en 1957 kaj gvidata jam de multaj jaroj de f-ino C. Hueter el Francio. Efektive, tiun Servon fondis s-ro Daniel Luez en 1955 kaj, laŭ lia propono kaj peto, en 1957 ĝi fariĝis oficiala servo de UEA. Ekde 1957 f-ino C. Hueter transprenis la prizorgadon de KSM en la kadro de UEA.

Tiu ĉi ero kompletigas ĉap. 4.3.4 de *Esperanto en Perspektivo*.

V-a INTERNACIA KONFERENCO DE LA NEŬTRALA ESPERANTO-MOVADO

La Organiza Komitato konsistas el jenaj gesinjoroj:

S. Sakellaropoulos, G. Griniacos, K. Koliopoulos, A. Sakellaropoulou, N. Binari, kaj f-ino E. Polimeropoulou kaj la junulo K. Zaĥarakis.

Al la redaktoro de
der esperantist,
Charlottenstrasse 60,
108 Berlin,
GDR.

Sinjoro Redaktoro,

"Aldone al la disputo Blanke-Ojalo-Harkovskij"

Kun intereso mi sekvas la diskuton (verŝajne, tamen, ne temas pri "disputo", kiel indikas via titolo en "der" 87), kiu daŭras jam tri jarojn precize ekde la publikigo de via recenzo pri *Esperanto en Perspektivo* en "Paco" de 1975. Al la baza koncepto de tiu recenzo kaj al kelkaj ĝiaj konkretaj asertoj mi verŝajne respondos en konvena momento per ampleksa artikolo en la revuo "Horizonto". Ĉi tie mi limigas min sole al 2 punktoj:

(1) En mia tre longa aktivado por la Internacia Lingvo mi neniam venis al la ideo rigardi aŭ nomi la esperantismon, aŭ eĉ la lingvon mem, ia "ideologio", ĉar, kompreneble, tio ĝi ne estas. Sed mi ja akceptis kie' science ĝustan tiun idearon de humaneca internaciismo, kiun Zamenhof konscie ligis al Esperanto, kaj kiu en ĉiu okazo, eĉ sen la eksplicita starpunkto de Zamenhof, estas socie, t.e. *objektive* nedisigebla de la Internacia Lingvo. Zamenhof nomis tiun idearon "interna ideo". Mi mem, ekde la studentaj jaroj, preferis la formulon "humaneca internaciismo ligita al la Internacia Lingvo", ĉar la esprimo "interna ideo" ŝajnis al mi science neadekvata (neniu lingvo kiel tia entenas en si ian internan ideon) kaj ankaŭ tial, ĉar tiu esprimo, do pure formala neadekvateco igis la idearon mem facile vundebla kaj viktimo de atakoj ekster la Esperanto-Movado kaj, parte, ene de ĝi, kiel pruvas ankaŭ kelkaj kontribuajoj en via diskuto. Tiun kaj la kunligitaj demandoj rilate la materiajn kondiĉojn kaj iliajn ideojn manifestiĝojn, kiuj kaŭzis la formiĝon, ekeston kaj evoluon de la Internacia Lingvo mi abunde pritraktis kaj prilaboris en multaj artikoloj, prelegoj kaj paroladoj, tre detale en la Unua Parto de *Retoriko* kaj koncize en *Esperanto en Perspektivo* (p-oj 3-44). Por konduki la diskuton el abstrakto de neta subjektivismo en realecajn dimensiojn, ĉu ne estus science korekte kaj en rilato al Zamenhof kaj en rilato al la aŭtoro, kies tezoj troviĝas en la radikoj de via diskuto, publikigi en via gazeto tiun ĉi leteron kaj almenaŭ la sekcioj 2.2 kaj 2.3 (7 paĝoj) aŭ eĉ nur la parteton 2.3.3 (unu paĝo) de *Esperanto en Perspektivo*? Anticipe mi donas la permeson.

(2) Cetere, se lingvo — kiu ajn lingvo — fakte estus nenio alia ol nura rimedo de komunikado, senigita de kia ajn ideo aspekto, siavice rezulto de la materiaj kondiĉoj, kiuj tra la procezo de reciprokaj interagoj *en la lasta linio* determinas kaj la formiĝon evoluon de la lingvo kaj la koncernan idearon, kiamaniere science ekspliki, ekzemple, la formiĝon de la modernaj nacioj, de iliaj komunaj literaturaj lingvoj kaj de la ideo, eĉ emocia, ligiteco de la nacioj al siaj naciaj lingvoj, kiujn ili prave rigardas kiel la ĉefajn elementojn de siaj respektivaj naciaj identecoj? Se estus tiel, do kian sencon havas la grandaj antagonismaj luktoj sur la lingva kampo kaj interne de ŝtatoj kaj en mondaj kadroj? Kaj, plue, kial entute ekzistus la lingva problemo, kiu akriĝas de tago al tago, se oni facile povus utiligi kiun ajn nacian lingvon (nuran rimedon) por internacia komunikado? Fine, se ankaŭ la Internacia Lingvo fakte estus nura rimedo (aŭ "ilo"), sen kia ajn ligo kun la humaneca internaciismo, kial, do, tiu rimedo, kvankam bedaŭrinde ankoraŭ malforta, estis kaj plu estas objekto de malpermesoj, persekutoj kaj ĉiaspecaj ĉikanaj fare de diversaj potencaj naziaj kaj aliaj ekstreme naciismaj politikaj fortoj, kiuj tamen ne sukcesis detrui ĝin?

Verŝajne por la abonantoj de via gazeto estus interese legi viajn respondojn al la supraj konkretaj demandoj.

Kun salutoj

I. Lapenna

Noto de la redakcio de *Horizonto*

Per sia letero de 11.07.78 la redakcio de "der esperantist" rifuzis publikigi la supran leteron.

En STARTO (1978-4) Karel Piĉ daŭrigas sian kampanjon. "Al Esperanto, li skribas, oni ne povas apliki metrojn kaj mezurilojn de la okcidenteŭropaj lingvoj. Car Esperanto ne estas okcidenteŭropa lingvo". Kvazaŭ la lingvo estus okcidentigita de la okcidenteŭropaj esperantistoj! "Bedaŭrinde kiel lingvo de spirita revolucio, li plue atakas, certe ne povus servi tiu ŝima francaĵo, kiun oni provas subŝovadi al ni nun!" Se per tiu "ŝima francaĵo" li aludas pri kelke da neologismoj, li unue bonvolu rimarki, ke la plimulto el ili (kiel "ensamble", "domini", ktp.) estis enŝovitaj ĝuste de orienteŭropaj esperantistoj! Sed plie jen li preferas ekuzi la forĝitan de li mem formon "elkludi" al la tradicia "ekskluzivi"! Por kiam do la Plena Vortaro reformita de Piĉ?

En der esperantist (1978-4) post "Rezolucio kontraŭ la neŭtrona bombo" kaj "Komunikado pri la XI-a Konsultiĝo de Esperanto-organizaĵoj de Eŭropaj socialismaj landoj" akcentanta "la rolon de esperantistoj en la batalo por la paco, malstreĉiĝo kaj malar-mado", kvazaŭ sufiĉus ekkrii: "Vivu la paco", por ke ĝi kiel en la Biblia Genezo tuj estiĝu! enestas kvar suplementaj paĝoj pri "POLITIKAJ LEGAĴOJ" kun jenaj titoloj: "Kelkaj pensoj de Maksim Gorkij pri Esperanto" — (Kio en si mem ne estas politika!) — sed ankaŭ: "Eliro fi-detruiga de la kolonialistoj portugalaj" — Novnaziismo: esprimo de la nesubigita pasinteco kaj nestabila situacio en FGR". Jen supozeble la nova koncepto de neŭtraleco konforma al la statuto de UEA!

En esperanto-revuo (septembro 1978) d-ro Humphrey Tonkin en sia parolado konfesas: "Mi diru al vi tute sincere, ke en tro da landoj, en tro da landaj asocioj, kaj inter tro da landaj asocioj, ekzistas nuntempe diversaj fendoj, diversaj miskomprenoj, diversaj interbataloj". Kion do li mem faris de 1969 ĝis 1974? Aliflanke dum la Komitata kunsido la Estrara Raporto "provokis viglan diskuton. Aŭdiĝis opinioj, interalie, ke difinitaj ĉapitroj de la Raporto tro atentigas okazintaĵojn en la Okcidenta Eŭropo kaj pretervidas gravajn atingitaĵojn en aliaj landoj..." Jen kiel orkestrita estas la kampanjo! Krome "la Raporto parolas multe pri planoj por la estonta agado, anstataŭ unuavice enfokusigi rezultojn de la koncerna laborperiodo..." Kompreneble estas pli facile paroli pri planoj ol pri rezultoj! Kaj "malgraŭ tiuj kaj aliaj rimarkoj, la Estrara Raporto estis akceptita sen kontraŭaj voĉoj, kaj nuraj kvar sindetenoj". Rimarkinde!

Fine en KONCIZE (jul.-sep. 1978) Jean-Pierre Davy deklaras: "Siatempe TEJO mem ne hezitis ekzameni tiun vastan problemaron ("insidaj ligoj inter la lingvaj problemoj kaj la ekonomiaj-politikaj problemoj"); cetere ŝajnas, ke unu el la atingoj de la "Hamburgaj eventoj" ĝuste estis redifino de la koncepto "neŭtraleco" en multe pli vasta senco". Senkomente, ĉar jen plia konfeso pri politikigo!

J. T.

Ĉu UEA observas sian laŭstatutan neŭtralecon?

MONDA ASEMBLEO DE LA PAKONSTRUANTOJ

13. Aliĝkondiĉoj. Ĉiu Landa Asocio Esperantista povas aliĝi al UEA... se vidiĝas klare el ĝia statuto, ke temas pri asocio neŭtrala laŭ la senco de par. 4.

Novjara mesaĝo de la prezidanto de Universala Esperanto-Asocio

Ni nin esprimas por evoluo de nova erdo en la mondo, apogita elpreke profitdona kunlaboro, taksas la kontribuojn batalon por interkonsentoj, kresco de neŭtraleco.

GENSFORSAMLINGE
ASSEMBLÉE MONDIALE
RAUHAN RAKENTAJIEN MAAN

de la X-a Konsultigo de Esperanto-organizaĵoj el eŭropaj socialismaj landoj

En la tagoj de la 10-a ĝis la 13-a de marto 1977 j. en Karl-Marx-Stadt (GDR) okazis la X-a Konsultigo de Esperanto-organizaĵoj el la jenaj landoj: Bulgario, ĈSR (GDR, Hungario, Pollando kaj Sovetunio.

ENIAVO

REZOLUCIO

pri la subteno por la II-a Stokholma Alvoko

Komuniko de la X-a Konsultigo	2
Monda Asembleo de la Pakonstruantoj debatis en Varsovio — Lech Kosieniak	3
Kontribuo de Nikola Aleksiev dum la Monda Asembleo de la Pakonstruantoj	5
Alvoko al ĉiuj nacioj	6

Polaj esperantistoj kunvenintaj por la XIX-a Tutpola Kongreso de Esperantistoj kaj Landa Kunveno de la Delegitoj de Pola Esperanto-Asocio en Szczecin de la 15-a ĝis la 17-a de oktobro 1976 j., post la kunveno kun la II-a Stokholma Alvoko pri haltigo de vetermilitado, proklamita de la Monda Pac-Konsilantaro dum la Konferenco en Stokholmo la 2-an de junio 1975 j., aliĝas al la tutlanda kampanjo subteni la Alvokon, konforme al la rekomendoj de la alvoko al la pola nacio proklamita en Varsovio la 3-an de septembro 1976 j. de la Prezidiumoj de la Tutpola Komitato de la Fronto de la Unueco de la Nacio, de la Tutpola Pac-Komitato, de la Centra Konsilantaro de la Sindikatoj, de la Asocio de la Batalintoj por Libereco kaj Demokratio kaj de la Pola Socia Komitato por Sekureco kaj Kunlaboro en Eŭropo.

SEN KOMENTO! JUĜU MEM.

La ĉi-supra reproduktaĵo estas prenita el unusola numero de "POLA ESPERANTISTO" aperinta en 1978 kun unujara malfruigo.